

LUDOVIKO TOTSCHÉ-TÁRKONY

# DE PAĜO AL PAĜO

LITERATURAJ PROFILOJ

*Al K. Kalocsay  
admire  
la aŭtoro*

La ĝisnuna esperanta kritiko havis du ĉeftendencojn: detalan, zorgan elsarkadon de la lingvaj pekoj kaj pardoneman indulgon, se temis pri la literatura valoro. Estas ja kompreneble: internacian lingvon oni devas rigore gardi kontraŭ disfalo; ankaŭ la indulgo estis memkomprenebla, ja oni ĝojis, ke entute aperis esperanta libro, ke entute iu emis oferi sian tempon kaj energion por esperantlingva verkado. Laŭ mia opinio la unua tendenco eĉ nun ne estas forlasebla, ĝi ĉiam devos esti grava vidpunkto por recenzistoj juĝontaj esperantajn librojn; sed la tempo de la dua tendenco forpasis nereteneble. Nun la esperanta literaturo jam havas altkvalitajn verkistojn kaj en la originala, kaj en la traduka parto; jam alvenis la tempo, distingi inter ili: ni rekonu niajn verajn talentojn, ni ekkonu iliajn verkojn, ni klarigu iliajn kvalitojn; kontraŭe ni komprenu, ke aliaj, eble ankoraŭ modaj verkistoj jam nekontesteble apartenas al la pasinto: ni aprezu ilian literaturhistorian signifon, sed ni ne prisilentu, ke sian karieron ili dankas al sia feliĉa *senkonkura* situacio.

Tiu ĉi libro ne fanfaronas pri tio, ke ĝi faris la nepre necesan *trataksadon* de niaj literaturaj valoroj. Por tio ĝi ja estus eĉ malampleksa, la pritraktado de multaj gravaj kaj aktivaj verkistoj mankas el ĝi, en kelkaj ĉapitroj ĝi temas nur pri po unu verko de iu aŭtoro. Se diversaj motivoj malhelpis min doni *plenan* bildon pri la *nuna* esperanta literaturo, tamen dum la verkado de la libro min gvidis la supre menciitaj principoj.

Eble ŝajnos al kelkiuj, ke mia taksado kelkfoje estas tro severa, ke ĝi kelkfoje ne harmonias kun la nuna ĝenerala opinio. Mi rekonas, ke en la esperanta literaturo eĉ nun oni ne povas apliki la saman mezuron, kiel en la naciaj literaturoj. Por atingi tiun nivelon estus necese, ke la esperanta literaturo donu al siaj verkistoj la saman ŝancon por povi vivteni sin per la verkado. La plejmulto de niaj verkistoj laboras post laciga taga penado... Sed la nivelon jam nun oni devas levi kiel eble plej alten. La kritiko ne rajtas rezigni pri sia kontrola rolo, nur per malfermitaj okuloj, per sincera parolo ĝi iĝas konstruanta faktoro!

Estas certe, ke centprocenta objektiveco estas iluzio. Sed estas honora devo de la kritikisto *almenaŭ klopodi* por ĝin atingi! Tiu ĉi libro pritraktas verkistojn, kies libroj apartenas al la de mi plej ŝatataj volumoj de mia esperanta biblioteko. Tamen kun trankvila konscienco mi povas aserti, ke min ne gvidis personaj motivoj. Ian partiecon mi jam nun humile konfesas: mi preferas la librojn de tiuj aŭtoroj, kiuj brilas ne nur per la verkista talento, sed ankaŭ per la lumo de la intelekto! Miaj legantoj bonvolu pardoni tiun ĉi pekon! Mi ne tro alte taksas la nuramuzan literaturon, kvankam mi rekonas ĝian gravan signifon por la komencantoj. Sed ĉu la esperanta publiko konsistas nur el komencantoj? Mi neas tion eĉ kontraŭ kelkiuj, kiuj asertas bone koni la publikon. La *eblo*, la genia *ilo* ekzistas: ĉu ni, filoj de diversaj gentoj, mirakle

liberiĝinte de la altrudita muteco, ne havas gravajn, interesajn dirotaĵojn unu por la alia? Amuzan literaturon ni povas abunde ĝui ankaŭ nacilingve.

En la libro mi uzis kelkajn neologajn vortojn. La vortojn, kiuj ne estas ĝenerale konataj, la leganto trovas ĉe la fino de la libro. La senĉesan plendadon de kelkiuj kontraŭ la uzo de kelkaj necesaj novaj vortoj mi trovas nemotivita. Neniu protestas kontraŭ la teknikaj fakvortoj, ĝuste nur la poezio kaj la neporamuzaj, plipretenda prozo ne rajtus havi siajn fakvortojn? Certe ne licas, ke la leganto trovu vortojn en la libro, kiujn li vane serĉas en la vortaroj kaj kiujn la verkisto ne klarigas. La verkisto ĉiam klarigu ilin! Mi pensas, ke la plendoj ĉesos post la apero de la poezia faklibro, kiun Literatura Mondo eldonos en tiu ĉi jaro. Ĝi donos plenan liston kaj klaran difinon pri ĉiu neoficiala fakvorto, kiu nuntempe ŝajnas necesa por la literaturo.

La diletantismo en la esperanta literaturo sendube iĝis malaktuala. Tie kaj tie aŭdiĝas novaj tonoj, vidiĝas novaj vizaĝoj. Ekparolas verkistoj: kelkaj jam maturaj viroj, aliaj ankoraŭ junuloj, kelkaj jam famaj favoratoj de la publiko, aliaj ankoraŭ sennomaj komencantoj, iliaj literaturaj klopodoj estas plej diversaj, iliaj verkistaj iloj tre diferencaj. Kaj tamen ne eraras la kritikisto, se en ilia verkista sinteno li malkovras komunajn trajtojn: forturniĝon de la naiva romantikismo, kiu karakterizis la postmilitan epokon de la esperanta literaturo; firman ekstaron sur la Fundamento, sed forĵeton de ĉiu obstina, malprodukta

konservativismo; progresemon, kiu ne renversas, sed plukonstruas la lingvon; honestan, seriozan klopodon por leviĝi al la intelekta nivelo de la naciaj literaturoj. La nebulaj iluzioj de la romantikismo disiĝis, nun venas la celkonscia laboro de la

JUNA ESPERANTO!

*Budapest, marto 1932.  
Ludoviko Totsche.*

## Julio Baghy

Post la altrudita dummilita inerto kaj vegetado, nia movado subite ekfloris. La homoj, kiujn ankoraŭ turmentis la vizioj pri la ĵusaj teruroj, volonte rifuĝis en la konsolan iluzion, ke la tero, post la abunde verŝita sango alportos repacigan rikolton: la eternan pacon. La ĝenerala interesiĝo sin turnis al la rimedoj, per kies helpo oni povus efektiviĝi la belan revon. Estas ja kompreneble, ke Esperanto, kiu koncipiĝis en la nobla intenco: servi al tiuj ĉi idealoj, disvastiĝis kun mirinda rapido. Paralele kun la kresko de l' publiko kreskis ankaŭ la interesiĝo al esperantaj libroj. Nia literaturo evoluis en proporcioj ĝis tiam ne konjektitaj.

Sur la firmamento de l' esperanta poezio ekbrilis flamanta kometo: poeto, kun tute nova tono, kun tute originala ritmo, poeto, kiu heroldis la sopiratan feliĉan estonton, poeto, kiu fortvoĉe esprimis la dolorajn erupciojn de sia baraktanta animo. Li venis el la inferaj suferoj de l' militkaptiteco, ĉiujn liajn ideojn, idealajn klopodojn naskis travivaĵoj... Kaj li ne kontentiĝis pri verkado de poemoj, li prizorgis, ke ili trovu la vojon al la publiko. Nia literaturo fermentis, tie kaj tie ĉi sendepende de Baghy, eklaboris junaj viroj ĉizante la lingvon en tradukitaj aŭ originalaj versoj, sed ili plejparte laboris por sia

skribotablo nur foje kaj foje aperigante ion, inter ili ankaŭ tiu genio, kiu jam tiam konscie laboris pri sia verkaro, destinita por levi nian poezion al la nivelo de la plej eminentaj naciaj literaturoj. Baghy ne kontentiĝis pri tia ensola laborado, li paŝis antaŭ la publikon, li mem interpretis siajn poemojn per artista preteco, li aperigis tutan libron plenan de individuaj, sonoraj poemoj. Evento tiutempe unika en nia literaturo! Krom la monumentaj himnoj de Zamenhof, nia originala poezio ne estis riĉa. Dise aperis poemoj, sed mankis forte akcentita poeta individueco. Baghy alportis la *originalan lirikon esperantan!* Kaj li ne estis nur poeto, li estis bonega instruanto, nelacigebla propagandisto; kie li aperis, ekfloris la movado, ekfirmiĝis la fido... Ĉu estas do mirinde, ke li per unu sturmo venkis niajn orelojn kaj korojn?

Baghy en ĝusta momento eksonigis ĝustan kordon: tio estas la sekreto de lia sukceso, tute eksterordinara en la esperanta literaturo.

La romantika revo pri proksima Nova Epoko disiĝis rapide. La bardo de tiu ĉi heroo romantikismo preskaŭ tute ĉesigis la verkadon de poemoj por trovi novajn triumfojn sur la tereno de l' prozo. Estas la tasko de l' kritikisto sin sendependigi de la sorĉa sugestio de tiu ĉi poezio, de tiu ĉi magneta poeta individueco, por surmontri per objektiva mezurado: *kio* el tiuj ĉi poemoj restis porĉiama valoro kaj *kio* dronis neeviteble en la efemerecon de l' elmodiĝinta aktualeco. Malfacila tasko por iu, kiun persona ŝato ligas al la poezio de

Baghy, sed ĝin plifaciligas, ke Baghy ĉiam akceptis kritikojn kun komprenema bonvolo, por li ja estas evidente, ke seriozan kritikon, naskas ĉiam honesta intenco.

### **Preter la Vivo**

Se oni foliumas la poemlibron de Baghy, la unua impresado de l' leganto estas, ke Baghy havas tute individuan, tute originalan ritmosistemon, kiun oni ne povas envicigi inter la jam konatajn sistemojn (germana, franca ritmo). Ĉiu el liaj poemoj havas ian propran muzikon, ian individuan melodion; mi estas certa, ke unuafoje naskiĝas tiu ĉi melodio kaj laŭ la ekvovita melodio verkas la poeto poste la versojn. Kaj se li ekvovas la melodion de l' unua strofo, la ceterajn strofojn li konstruas severe laŭ la sama melodio.

Kaj se oni kontrolas el tiu ĉi vidpunkto la poemojn de la volumo, oni devas veni al la rezulto, ke Baghy havas originalan ritmaron, propran por ĉiu poemo kaj ke la skemo de la unua strofo ripetiĝas en la ceteraj strofoj. Kaj ni devas rekoni, ke multaj el tiuj ĉi skemoj estas tre sonoraj, kio faris la poemojn de Baghy tre konvenaj por muzikigo.

Al la melodia ritmo pariĝis rimoj plejparte tre bonaj, ofta, en nia poezio ankoraŭ nekutime nova uzo de mezrimoj, aliteracioj: ne estas do mirinde, ke la



sensa efekto de tiuj ĉi versoj ravis la esperantistajn orelojn ankoraŭ ne tro dorlotitajn.

Sed la riĉa ritmokrea kapablo pruviĝis danĝera donaco. Ĝi ravis ankaŭ la orelojn de l' poeto, ĝia facila glito kuntiris ankaŭ lin, kaj pro la intenca ludo per la ekstera formo li neglektis la konsciencan ellaboron de l' interna formo. Sed nenio maljuniĝas pli rapide, ol la nura ekstera efekto... Por savi la poemon por la estonto estas necese, ke ĝia temo, ĝia interna kerno estu fandita en ian, pli precize nedifineblan, sed klare senteban *internan solvon*, kiu signifas, samon por la verso, kiel la batanta koro por la korpo... Bedaŭrinde en multaj poemoj de Baghy ĝi mankas. Al la formaj propraĵoj de la Baghy-poemoj apartenas ankaŭ tio, ke la poeto tre ŝatas emfazi vortojn, aŭ eĉ tutajn versliniojn de siaj poemoj. Kion li pensas pli grava, tion li markas per kursivaj literoj, apartigas per streko, distingas per krisigno. Laŭ mia opinio oni devus nur tre ŝpareme uzi tiujn ĉi helpilojn. Ilia trouzo rezultigas, ke la senperan kontakton inter la leganto kaj la poemo la poeto mem interrompas per tiuj ĉi signoj, kiuj kvazaŭ komentarias, klarigas la tekston. La leganton ĝenas, ke oni volas klarigi al li ion, kion li ja ankaŭ sen la klarigo bone komprenas. Baghy precipe ŝatas disigi per streketo la lastan vorton (aŭ vortojn) de la strofo, eĉ se tio estas tute superflua. Ekzemple en la versoj:

»kaj inter aromaj odoroj de l' narcisoj  
min lulu je dormo de l' vintro — *ŝiaj kisoj!*«.

la triopa emfazo (streko, kursivaj literoj, krisigno) nepre donas la impreson de superflueco, eĉ, de ia konvulsia senpovo.

La sama nefeliĉa tendenco montriĝas ankaŭ en kelkaj noveloj de l' aŭtoro, en rakonta prozo ĝi efikas eĉ multe pli afektita.

La dua konstato, kiu spontanee trudiĝas al la leganto de la Baghy-poemoj, estas, ke li estas neelĉerpeble riĉa je lemoj, ke li estas *temogenio*. Ĉu profunda persona travivaĵo, ĉu hazarda humoro, ĉu momente aperinta bildo, ĉu kaprica ekpenso: en la cerbo de Baghy ili tuj prenas la formon de versa aŭ proza temo. Kia abundo! Jen vintra vizio pri la funebra korvokrio tordanta la korojn sur la neĝaj vojoj de Siberio (Siberia Romanco), jen emocia rememoro pri la patro, pri la

»sortorompita, kara maljunul'«,

jen ĉarma idilio, simpla kaj sincera sento en la karcero de l' kruela caro (*Idilio*), jen malesperaj akordoj pri perdo de amatino (*Agordo*), jen dramefika ĝemo: *La Majstro mortis*, jen melankolia anonco pri la alveno de la aŭtuno, jen majesta bildo, sugesta silueto pri la izoleco de l' individua sorto (*Sur roko izola*), jen *Sangaj larmoj*, profunda kompato, senpova baraktado, potence reliefigita

simbolo pri la homa sufero (certe unu el la plej sukcesaj Baghy-poemoj), jen *Preĝo sur la strato* pri gazetvendanta eta knabino, amara odo pri la mizero de l' Urbo, verkita per perfekta artismo, jen dolĉaj, dancantaj triloj de momenta humoro (*Momentoj*), jen dolora revado de soliĝinta animo (*Dolora deziro*), jen *Turmentaj demandoj* de infano al la patrino devojiĝinta al la peko, jen vizia sonĝo pri la amatino, kiun la poeto imagas sur egiptan teron, poemo trafe pentranta la ĉiam saman sklavan sindonon de l' vira amo (*Vi kaj mi*), jen la eta juvelo: la *Milita fablo*, kiu per Victon Hugo-a patoso de l' emocia ĉarmo parolas pri la teruroj de l' milito, jen groteskaj ŝercoj de *Sanga nokto*, aŭ *Nazo de Athanazo*... Pri tiuj ĉi lastaj mi tute ne povas akcepti la severan prijuĝon de Hohlov. Kiel ni vidos pli poste, sarkasma humoro, pikanta satiro fariĝos la plej forta flanko de Baghy.

Ankaŭ pri la homarismaj poemoj de Baghy mi ne povas identigi mian opinion kun tiu de Hohlov. Laŭ Hohlov Baghy en ili trovis sian veran medion, sed mi pensas, ke ĝuste en tiuj ĉi poemoj li estas malpleje artisto. Tiuj ĉi poemoj venkas niajn korojn por la homo, kiu tiel firme, kuraĝe, persiste batalas por siaj idealoj, sed ni devas bedaŭri, ke la poeto cedis sian lokon al la apostolo. Kelkaj el tiuj ĉi poemoj impresas la leganton kvazaŭ gazetartikoloj. Kio estas tamen la sekreto de ilia sukceso ĉe la publiko? La *vivanta voĉo* de la poeto, kiu nekontraŭstareble sugestias dum deklamado, la fajra, elokventa

esprimo de la komunaj ideoj... Sed dum lego ili sonas nesaveble malplene, neeviteble false! La poeto ne konvinkas nin per la efikiloj de artista prezento, li nur ardas, entuziasmigas, aŭ vipas, indignas, abunde li uzas la vortojn »homaro«, »homeco«, »paco«, »milito«, »envio« (ĉi tiun lastan li uzas iom mistere), »sufero« k. t. p., sed neniam interna poezia vero apogas la moralan enhavon. La kordo de l' bardo sonas ĉiam forte, ĉiam kresĉende, do tiu senĉesa ardo fine enuigas kaj lacigas la ne tro naivan leganton, je kies oreloj la vorto »homeco« fine efikos per sama indiferento, kiel kiu ajn triviala vorto de l' ĉiutago!

En la Baghy-poemoj svarmas la bonaj temoj, sed surprizas la leganton, kiom multe el ili estas abortitaj. Kun la bonkvalita, eĉ multfoje grandioza temo ne ĉiam harmonias la ellaboro, la faro de la verso. Kelkfoje eĉ en liaj plej bonaj poemoj. Ekzemple en la *Sangaj larmoj* li salutas la mistikan, tropikan landon de l' ekvatoro, pri kiu li songĝis infane kaj li volas sensigi, kion li vidas:

»Jen palmoj borderas zigzage la bordojn,  
en nestoj ektrilas birdkanto kun ĝoj'  
kaj portas la vento muzikajn akordojn  
el pajla kabano, staranta ĉe l' voj'...«

En tiuj ĉi anemiaj versoj krom la banala palmo nenio perfidas, ke temas pri

tropika pejzaĝo, oni tute ne ricevas bildon pri la individua karaktero de tiu »lando mistika«.

La saman malegalecon de l' kvalito ni trovas en liaj *Sableroj*, kie apud vere bildaj kaj spritaj pecoj, kiel:

»Kompreni la vivon signifas — doloron,  
Nur por senkorulo ĝi havas valoron.«

»Ne la nomo faras faman homon,  
sed la homo faras faman nomon.«

ni trovas tute malfortajn, kiuj esprimas ian nebulan filozofion aŭ kiuj per neĝuste elektita bildo volas prezenti la penson; pri tiu ĉi lasta jen ekzemplo:

»Humanismon predikas  
servisto en stalo,  
sed pro batoj de l' vipo  
sangŝvitas ĉevalo.«

la penson ilustras falsa bildo: servistoj en la stalo kutime ne predikas humanismon.

Multajn lokojn mi povus ankoraŭ citi, kie la poemoj de Baghy subite

»falas«, kie nin ĝenas vorto aŭ frazo nekonvena aŭ pala. Ekzemple, en la cetere tre fort-impresa »*Siberia lulkantoi* kia falo estas post »kri' de l' morto« la »son' de l' plor'«! Kiel svenaj estas la versoj:

La impresojn, inspirojn de l' poetec'  
Tuj mortigas la realec'.

Kiel strange, ke *eta knabino* tiel parolas al sia patrino: »La vangojn fremdigas ŝminkita purpur'«. Kiel malagrabla, ke en la cetere tre bela poemo *Rememoru!* la strofojn komencas tute superflua »se«, kaj per tio la poemo ne havas ĉeffrazojn! Kiel senforte, ke »plena luno sur ĉielo komprenante *movis sin.*«

Multajn tiajn ekzemplojn mi povus ankoraŭ citi, rimojn, kiuj ne levas, sed platigas cetere tre belajn poemojn, solvojn, kiuj ŝajnas tute improvizitaj, kaj atestas kvazaŭ pri senpacienco. Jes, senpacienco! Eble ĉi tio estas klarigo por ĉio ĉi. Kiel mi diris, Baghy estas temo-genio. Liaj ekpensoj, ideoj, temoj venas al li tiel riĉe, preskaŭ inunde, ke iel li ne havas tempon por sufiĉe okupiĝi pri ili. Ĉi tiuj temoj ekkaptas lian animon, li ekamas ilin, en ĉi tiu ekamo li eklaboras pri la temo, kaj preskaŭ ĉiam kun granda vervo kaj tre sukcese. Kaj vere, apenaŭ oni trovas, eĉ inter la plej malfortaj, tian poemon de Baghy, kies komenco ne estus plaĉa, forta, impresiva. Kaj — oni nur malofte trovas Baghy-poemon, kiu ĉi tiun vervon konservus ĝis sia fino, kun kontinua senlaceco. Tiuj

poemoj, kie li sukcesis pri tio ĉi, estas la veraj trezoroj de lia liriko; mi citu: *Idilio, Sur roko izola, Preĝo sur la strato, Momentoj, Dolora deziro, Ni songas, Vi kaj mi, Milita fablo, En la tombejo*. En la ceteraj oni trovas tie ĉi kaj tie ion, kio ĝenas, kio pli-malpli fuŝas la efekton. Kaj — ju pli bela estas cetere la poemo, des pli dolora estas tia fuŝo, kvazaŭ subita vangofrapo de karesanta mano.

Krom la supre dirita senpacienco, la kaŭzo de tiu ĉi malegaleco de ellaboro estas tute certe ankaŭ tio, ke Baghy ne volis sin doni al la pena kaj humila, sed ĉiam tre fruktodona laboro de la tradukado. La tradukado estas konstanta peno: esprimi ion tute precize kaj koncize, ne deflankiĝante de la originala teksto; la tradukado ne toleras preterlasojn, ĉirkaŭirojn, ĝi postulas kompletan solvon de la granda rebuso: trovi striktan esprimon por la penso. Kaj vere, ĉe kelkaj, enhave kaj ideo tre belaj, Baghy-poemoj oni sentas la tenton: retraduki ilin el ilia imagita, pensa originalo, por ke ili havu la perfektan formon, kiun ili meritis. Kompreneble ĉi tiun retradukon povus fari nur Baghy mem, kiu ja sin montras ofte tiel brilanta majstro de formo, ke kun iom da pacienco kaj peno li certe povus ŝpari al ni doloron, kiun ni sentas pri la kruela sorto de kelkaj liaj pens-infanoj.

## Pilgrimo

La pli mallongaj poemoj de la dua versvolumo ne portis multon novan; iliaj mankoj kaj virtoj estas la samaj, kiel en la *Preter la vivo*. Sed oni povas konstati la plifortiĝon de la poeta esprimpovo, la pli artan brilon de la verstekniko. Feliĉan temvarion alportis la familia vivo. *Mia reĝlando* estas eta juvelo: la ĉambro estas la lando de la senkrona reĝo, en ĝi regas la blondkrona reĝino, kaj

Popolo estas bubo,  
tre vigla brava knab',  
rajdante sur genuoj  
li estas tuta stab'.  
La sceptro estas vergo,  
kaj kiel saĝa reĝ',  
mi batas la popolon,  
se tedas lin la leĝ'.

Novan tonon ekfrapas la poeto, kiam li eksperimentas per baladspecaj poemoj (*Legendo, Kantantaj postenoj*). Inter tiuj ĉi pecoj estas tre sukcesa la kortuŝa poemo pri *Ivaĉjo*: neniam, ne eĉ en la plej tondraj predikoj li esprimis tiel impresive kaj potence sian kredon kaj instruon pri *homeco*, ol en tiu ĉi



mildvoĉa eta ĉefverko. Ankaŭ la longa poemo *Post la batalo* havas multajn sukcesajn partojn. Per sia grandefekta finverso longe elsonoras en la animo la *Preĝo al la mortinta Dio*. En *Svislando*, *Infanoj en la parko*, *Tri fratinoj*, *Printempo*, montras, malgraŭ kelkaj pli malfortaj lokoj, senĉesan evoluon de esprimpovo, ellaboro, verstekniko. Per petola sonĵonglado sprite li ŝercas en la *Ran-kvarteto*:

kvar kvakantoj kvardekvoĉe  
kvartet-kvakas plenriproĉe  
pro mankhav' de l' kava kuvo...

La pli longaj poemoj montras decidan sinturnon al la filozofado. Tiatendenca inklino jam montriĝis ankaŭ en la unua volumo. La filozofado de Baghy cetere ne formas klaran, certe difinitan sistemon, ĝi restas ĉe malcertaj ĝeneraligoj, nebulaj imagoj. Kvankam tiuj ĉi poemoj (*Poeto kaj Muzo*, *Sklaviĝo*, *Patrino kaj filo*, *Liberiĝo*) ŝajnas esti fragmentoj de pli ampleksa, ne skribita verko, kiu, komplete, eble pli reliefigus tiun filozofion. Nu, la granda verko restis fragmento kaj — sincere — mi ne bedaŭras tion. Eĉ, feliĉe, ke Baghy sin dediĉis al pli valoraj kaj pli multpromesaj laboroj anstataŭ tiu ĉi filozofado, kiu plej ofte — ni konfesu — estas nur oratorado.

Ĉi tie mi devas mencii, ke ekzistas ia malproksima parenteco inter la

poezio de Baghy kaj tiu de Victor Hugo. Ambaŭ ŝatas la retorikon, la meditado, la brilan eksteran formon kaj la emfazon kaj ĉe ambaŭ la oratoro ofte mortigas la poeton.

La poeto iom post iom eksilentis, nur foje kaj foje li aperigas versojn. Li turnis sin al la prozo kaj tie li rikoltas surprizajn sukcesojn. Ni sekvu lin sur lia vojo.

### **Dancu Marionetoj, Migranta Plumo**

La lirikisto nur malfacile cedis sian lokon al la rakontisto. Multaj el la prozaĵoj, kiujn liaj novelvolumoj enhavas, ne estas noveloj, sed poemoj en prozo. Rilate al siaj temoj kaj al la sinteno de l' verkisto ili estas parencaj al la filozofiemaj poemoj de l' Pilgrimo. La maldika epika fadeno servas kiel nura preteksto por konigi al ni la ideojn de l' verkisto. Ili estas fortoĉaj akuzoj kontraŭ la peko, aŭ entuziasmaj hosanoj al la homa boneco. Bedaŭrinde, por konverti la leganton al siaj idealoj, la verkisto ne volas efiki per la sugestia forto de l' rakonto: li simple predikas ilin al ni. El tiu ĉi metodo sekvas, ke la leganto, se li jam antaŭe ne samopiniis kun la aŭtoro, restas indiferenta. La verkisto priatentis preskaŭ ekskluzive la tendencan enhavon, por li estis pli grava la »kio«, ol la »kiel«, tial li ne multe prizorgis la forman ellaboron. Tio klarigas, ke en la unuaj prozaĵoj restis partoj, kiajn li nun certe ne skribus,

ekzemple:

»ŝi rekuras, kuregas al sia ĉambro. La animo ploregas kaj skurĝas, ŝiras ŝian korpon. La nigra malespero taŭzas la malfortecon. Sia rigardo migras al la senlimeco de la firmamento, sed vane... Kvazaŭ ŝi luktus kun la indiferenteco en la dezerto de l' senkom-pateco.«

Feliĉe li rapide demetis tiun ĉi iom bombastan stilon: la lirikisto kaj la oratoro iom post iom retiriĝis en la fonon. La *Nur Homo* jam estas vera rakonto. Ĝia temo estas interesa: la sortoj de hungara militkaptito, edzo, kaj rusa virino, kies edzo estas militkaptito en Hungario; la vekigo de l' virino je nova amo, la konscienciproĉo kaj baraktado de l' viro, kiu ankaŭ ekamas la rusinon... hejmenveno de l' edzo... nebanala solvo. La rakonto fluas vikle, la interesiĝon de l' leganto nenio malhelpas, eble nur la iom troa moralizemo. Tiu ĉi lasta estas ĝenerala manko de la Baghy-prozo. *Tri kamaradoj*: sanga vizio pri la teruraĵoj de l' milito; groteska komenco, amaro rezigna fino. *Nigra Kristnasko*: unu el la plej fortaj Baghy-noveloj: kortuŝa historio pri mortanta juda knabo, kiu deziras, ke Kristo vizitu ankaŭ lin. La figuroj estas akre konturitaj, nenia superflua filozofado sin trudas inter la leganto kaj la rakonto, kaj tamen la perfekte ellaborita temo igas nin longe pripensadi.. La novelo *Nur*

*nature!* ree pravas, ke la iom bonintenca sarkasmo, milda satiro, lerta priuzo de komikaj situacioj prezentas la plej bonajn verkistajn proprajojn de Baghy. Tiuj ĉi kvalitoj kreis la figuron de Mihok, tiun ĉi ĉarman, mallertan, sed tamen ruzan samideanon, kiun kun ĉiam pliiganta interesiĝo ni sekvas sur lia zigzaga vojo, ĉu ĝi kondukas lin en la brakojn de la *tigra* kapitano Petroff, ĉu al la ne malpli danĝera haveno de l' edziĝo.

El la teatraĵetoj, kiujn enhavas la volumo *Migranta plumo*, mi trovas menciinda la rezignan, romantikan, emocian *En maskobalo* kaj la *Samumon*. La *Samumo* temas pri pasia amdramo, kun la kutimaj akcesoraĵoj: dezerto, sfinkso, serpentodanco kaj kun la ĉefrolanta samumo, detruanta en la dezerto kaj en la homaj koroj. Vere romantika dramo kun la neevitebla patosa retoriko, kiu ne povas sin liberigi de la sorĉa reflektorlumo de l' scenejo kaj restas fremda al la realaj tonoj de l' vivo.

## **Viktimoj**

Fabelo. Ĝia temo: vivo de militkaptitoj kun la multaj suferoj kaj maloftaj ĝojoj. Ĝia fono: la neĝaj kampoj de Siberio, kies horizonton lumigas la ruĝaj flamoj de l' senindulga interna milito. Ĝia ĉefproblemo: malespere pasia ama luktado inter viro kaj virino; la viro: militkaptito, artisto (aktoro kaj verkisto), edzo, kiu obstine kaj honeste batalas por konservi sian fidelecon al la

hejmelasita edzino, kiun li imagas same fidela kaj sopiranta; la virino: falinta anĝelo, malfidela edzino, demono, kiu unue ektrovas la veran amon en la pura, senmakula rilato kun la militkaptito. (Kiel ni vidas, la temo estas iom parenca al tiu de la novelo: *Nur homo.*)

La romanon mi nomis fabelo kaj mian aserton jene mi provas motivi: la figuroj ne havas difinitan, bone distingeblan individuan karakteron. La ĉeffiguroj estas trostilizitaj, troemfazitaj. La verkisto tro ŝatas sian ĉeffiguron: tiu ĉi Bardy fariĝas preskaŭ duondio. Li regas siajn kamaradojn sen tio, ke la aŭtoro montrus ties klaran kialon. Ne sufiĉas ĉiam nur diri pri iu, ke li sugestie katenas la aliajn, oni devus prezenti ankaŭ la propraĵojn, la eksterordinarajn kapablojn, kiuj motivas tian elstaran situacion. Ĉar la simpla mencio, ke Bardy estas talenta aktoro kaj reĝisoro, evidente nenion klarigas... Nu, se ni trovis nekomprenebla la rilaton inter Bardy kaj siaj kamaradoj, kion ni diru pri tiu inter la heroo kaj la virinoj? Li estas vera »filo de Feliĉo«, lia triumfa vojo estas pavimita per virinaj koroj, kiuj ardas kaj suferas nur pro li, kaj senĉese proponas sin al li... Kaj ĉi tie ni trovas la solan antipatian trajton de tiu ĉi pasiva, fabelheroo Don Juano: al la pasiaj amkonfesoj li ĉiam respondas per moralaj instruoj. La interna lukto inter la honesta devo kaj la loganta tento fariĝas moralpredika dialogo.

Katja, la demono, jam estas pentrita kun pli da realaj trajtoj. Sed ankaŭ ŝi

dankas sian ekziston al la romantiko. La transformiĝo de la demono je sinofera, pure amanta virino surprizas la leganton per sia subiteco. Ĝi ne ŝajnas psikologie motivita, ĝuste pro tio, ke ĝis tiam la aŭtoro, kvazaŭ mistifike, ŝin konjektigas nur voluptema diablino.

Doŝky, la fidela amiko, grafofilo portanta falsan nomon, kiu pro terura seniluziiĝo fariĝis virinmalamanto kaj kiu retrovis sian ekvilibron en la silenta adoro al suferanta edzino (vera anĝelo) de kruela kontraŭrevolucia oficiro; Morozov, la altranga edzo de Katja, kiu preskaŭ dum la tuta romano ne partoprenas la okazintaĵojn, pri kiu oni parolas kiel pri tre ĝentila, afabla homo, kaj kiu je la fino aperas kaj kondutas kiel sangavida monstro; Fiza, la stratknabino kaj ruĝa soldatino, kun sia kaŝita amo, ĵaluza venĝemo kaj nemotivita pardonemo: ĉiuj ĉi estas veraj fabelfiguroj. Mi ne dubas, ke ekzistas homoj, kiuj povus servi modele al tiaj figuroj, sed la verkisto neglektis starigi ilin en realan fonon kaj vestigi ilin per kredeble ekvilibrataj karaktertrajtoj. La plej elviva figuro de l' libro estas Izor, la brokantista judo. La bonvola ironio de l' verkisto donis fidelan fotografion pri konata tipo.

La malfavorajn flankojn de tia fabelspeca romano ni vidis, sed ne mankas ĝiaj triumfaj virtoj. La nekontraŭstarebla sugesta drivo de l' eventoj, la viglaj, kelkfoje dramefikaj dialogoj, la abunde riĉa fabeloplekto sorĉkatenas la leganton, kiu spirretene legas la libron kaj demetas ĝin nur tute ellegita. Tiuj ĉi

kvalitoj bone motivas la grandan sukceson de la *Viktimoj* kaj igas verŝajna, ke ĝi ankoraŭ longtempe estos unu el la plej popularaj libroj de la esperantia literaturo.

La libron finas grandioze konturita bildo. La heroo kun rompita koro kaj mortinta animo memvole elektis sian sorton: iri kun la mortvagonaro kaj dividi la faton de tiuj malfeliĉuloj, kiujn la triumfanta reĝimo sendis al la nekonfesita, sed de ĉiuj konata celo, al la certa kaj kruela morto. Fiza, la stratknabino, kies neglektitan amon la heroo povis repagi nur per kompata simpatio, malespere serĉas la vagonaron por almenaŭ kune morti kun la amata viro, se en la vivo li ne povis estis ŝia, sed ŝi venis malfrue...

»— Ĉu la vagonaro al Ruskij Ostrov?

— Ĵus foriris.

Malespera ekkrio. Fiza kuras sur la relojn. Malproksima ruĝa lampo. Nun ĝi malaperas. Mallaŭta formortanta klakado de radoj. Li iras for tie!... Li iras for!...

Fiza sin ĵetas sur la relojn kun freneza ekkrio.

— Neniam plu!... Neniam plu!...«

## Printempo en aŭtuno

Malfacile estas al mi skribi pri tiu ĉi libro. La kritiko preskaŭ unuanime laŭdis ĝin, kaj la aŭtoro evidente tre amas ĉi tiun sian libron, eĉ, eble ĝi estas lia plej kara infano. Li diris ie, ke neniam li estis tiel kontenta, kiel post la pretigo de ĉi tiu verko.

Kaj nun venas mia malfacila tasko, mi devas diri, ke al mi ĉi tiu libro simple ne plaĉas. Nu, jen, mi eldiris. Estas malagrabla, sed kion fari? La kritikisto havas la devon, malkaŝe paroli pri la mankoj; per tio li helpas al la aŭtoro pli bone ekkoni la eblojn kaj barojn de sia talento.

La aŭtoro nomas la libron »Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto«. Nu, mi trovas, ke tiom da dolĉo koncentreĝis en ĝi, ke ĝi fariĝis dika siropo. Ĉiu ĝia figuro, ĉiu ĝia okazaĵo, ĉiu ĝia dialogo naĝas en tiu ĉi siropo. Mi ne povas konsenti la inviton de K. R. C. Sturmer: »La leganto forlasu ĉiun antaŭjuĝon pri verŝajneco de evento kaj parolo, li donu sin plene al la poezia ekstazigo de la poeto.« En ĉi tiu verko la apoteozon de la juneco mi sentas lumo de artfajra alumeto, la ekstazan voĉon mi sentas siropo. Kaj vane volas s-ro Sturmer apartigi la belon kaj veron, kaj montri nenecesa la lastan, unuavice la manko de la interna vero mortigis tiun ĉi rakonton.

Almenaŭ por mi. Tamen, estas eble, ke multaj amos ĉi tiun rememoron pri



la juna amo, ili eble retrovos en ĝi siajn proprajn rememorojn pri la dolĉa tempo, kiam ĉio brila ŝajnis esti el oro. Tre kredeble, ke ĉi tiu juneco, kiu tamen-tamen vibras inter la linioj de la verko, havas tian potencon, ke helpe de la fantazio de la leganto, ĝi tratabiĝas tra ĉiu neverŝajneco de okazo kaj parolo, tra ĉiuj filozofiadoj de Balthazar, tra ĉiu siropo de penso kaj stilo. Tre kredeble, ke multaj dronos en dolĉaj revoj, legante: »La larmo estas dolorfenomeno«. »Kio estas tio ĉi? Ĉu terura vereco, en kiu troviĝas morto de ĉiu ambicio, aŭ nur penso, inspirita de la aŭtuna vespera ventomuĝo?« »Kaj la erarema malkuraĝa homo pro timo mensogas al si Eternan Vivon. Li provas rifuĝi, volas eskapi de la Vaneco kaj de la ŝtonplena vojo de la Vivo li transkuras sur la sopirfloran paŝejon de la Songo, kun nevelkebla espero vagadas en la Senlimeco, kiu kondukas al la Senmorteco...« ktp., ktp., ktp. La »strangaj, kuriozaj pensoj« de Balthazar estas balasto ankaŭ por la naiva leganto, kial kaj por kiu skribis ilin la aŭtoro? Verŝajne sole kaj nure por si mem. Nu, al li, kiu skribis jam tiel multe por la plaĉo de la leganto, certe licas foje skribi ion ankaŭ por sia propra plaĉo.

Estas interese tamen, ke, kiel ĉiam, ankaŭ nun montriĝas, ke Baghy estas temoplekta talento. Kiel lerte li povas ekirigi la rakonton! Ni sentas tuj interesiĝon. Kaj ankaŭ plue, li ĉiam povas streĉi la atenton pri tio, kio okazos? Kaj ĉi tiu streĉo de atendo tamen portas nin tra ĉiu siropo, plu kaj plu, ĝis ni

ellegis la libron. Kaj por tiu, kiu ankoraŭ ne sentas tute la guston de la lingvo, eĉ tiu siropo eble ne estos tiel trodolĉa. Kaj sekve de ĉio ĉi, Baghy, la magiisto, tamen faros eble la miraklon, li povos akceptigi, kaj ame akceptigi ĉi tiun al li tre karan infanon al la sensuspekta publiko. Kaj eble mi restos tute, tute sola kun mia decide malaproba opinio.

### **Hura!**

Ni vivas en la epoko de l' analizo. Kaj la literaturo estas ĝia fidela spegulo. La plej multsignifaj, plej gigantaj verkoj de l' nuna literaturo ne donas pli ol nuran vivisekciadon de l' vivo. Nenie troviĝas ĉio-unueciga, esenc-ekpalpa, universala koncepto. Kaj kie montriĝas timema eksperimento al sinteza mondpercepto, tie ĝi dronas en dubkonstruitan mistikon, aŭ foran utopion.

Per tiu ĉi eksterordinare interesa libro Baghy prenis sur sin duoblan taskon: per senindulga spegulmonro, per kruela grimaco, per sagaca sarkasmo li volis prezenti la ombrajn flankojn de l' ekzistanta socio kaj per sugesta simbolo li volis averti pri la estonta pli homa mondo. La vojoj de la du taskoj estas tre diverĝaj, sekve la ellaboro de la du temoj pretendas tute malsaman verkmanieron. Tie ĉi sin kaŝas la fundamenta struktura eraro de l' libro. Ĝi konsistas el du libroj, kiuj reciproke embarasas unu la alian. Tia kunkonstruo

malhelpas la plenan ellaboron de ambaŭ temoj. La ekvilibron de l' strukturo malfirmigas ankaŭ tio, ke en la faro de la du temoj li sukcesis malegale.

La grimaco estas vere majstra. Imagu: mizantropa orfeona dresisto testamentas por la ĉefurbo de fantazia lando 230 milionojn da dolaroj. Sed la kondiĉoj amarigas la malavaran donacon. Ili humiligas la gvidantojn de la urbo, ĉar ili igas ilin rezigni pri sia homa digno kaj rekoni sian parencecon kun la simioj solene riverencante al ili antaŭ la mokeme gapanta mondo, sed ĉu rifuzi la fabelan heredaĵon? Pri tiu ĉi kazo la testamentinto zorgis kun diabla ruzo: en okazo de neakcepto li testamentis la sumegon por la bono de la ĉefurbaj publikulinoj. Kaj nun ekiras la kapturna vetkurado post la mono, urbaj, ŝtataj, dinastiaj interesoj krucigas la vojon unu de la alia, incitiĝo de l' popolo, revolucio, ĉarlatanado de amerikaj friponoj komplikas la eventojn, kaj super ĉio rikanas la sola suvereno, la vera reĝisoro: la Mono. Per la helpo de tiu ĉi sorĉa ŝlosilo ni embuskas la sekretojn de l' urba kaj ŝtata gubernado. Kaj kiom da tipoj brile karakterizitaj! Kaj kiom da spritaj trovoj rilate al la elekto de iliaj nomoj. Kaj fine la supro de ĉio: la malfermo de l' sefo, kiu gardas la heredaĵon! En tiu ĉi neforgeseble pentrita, tranĉante satira sceno mi vidas la naturan kaj feliĉan finon de l' libro.

Baghy ĉiam surprizas per nova flanko de sia neelĉerpebla talento. En la *Hura!* li pruviĝas lerta, grandskala arkitekto de monumentaj amasscenoj. Estas

sufiĉe, se mi aludas la groteskan, infere amuzan demonstracion de la publikulinoj, aŭ la vervekscitajn scenojn de la revolucio!

La alia parto, la prezento de la »nova etiko por la nova Homo« ne sukcesis. La talento de Baghy nekontesteble inklinas al la analizo, al la pasia satiro, li estas vera Savonarola de la moderna socio, sed li ĉiam fiaskas, kiam li turnas sin al pozitiva konstrua sintezo. Tiu ĉi dua parto nur ŝarĝis la libron per ne tre klaraj meditadoj, per malsugestia, inerta fino, per la palaj figuroj de la juna Grauer kaj de la anĝele perfekta Tamara. Tamara estas korinfano de la verkisto, laŭ lia aserto ŝia modelo efektive estis aŭ estas vivanta, tamen en la libro ŝi estas nur okazo, por disvastigi la ideojn de, l' verkisto. Tiu ĉi dua parto estas kulpa ankaŭ pri tio, ke la okazintaĵoj ne povas grupiĝi ĉirkaŭ la natura ĉefheroo de l' libro, ĉirkaŭ tiu aminde ruza, genia Jonathan Krak. Li ricevis tro multe da rivaloj.

Se Baghy estus oferinta la trionon de l' libro, li estus verkinta libron, kiun rajte envidus kiu ajn nacia literaturo. Sed ankaŭ en sia nuna formo la libro apartenas al la plej interesaj, plej »sensaciaj« (en la plej bona senco de l' vorto) verkoj de nia literaturo. La talento de Baghy manifestiĝas en ĉiam pli monumentaj, en ĉiam pli larĝhorizontaj kadroj.

## Karlo Bodó

### La Cikonikalifo

**LA VERKISTO:** Miĥaelo Babits. Poeto, majstro de la interna kaj ekstera formo, ĵonglisto de la lingvo, ĝisfunda travivanto de la nacia, de la klasikaj kaj de la grandaj fremdaj kulturoj: inter la multaj, altkvalitaj poemoj (tute malbonan version li preskaŭ neniam skribis) troviĝas 25–30 tiaj poemoj, kiuj restos porĉiamaj suproj de la mondliriko (sed ĉu la aliaj grandaj lirikistoj havas *pli* da tiaj versoj?). Homo, kiu neniam hezitis defendi malpopularan aferon, se lia konscienco tiel diktis al li. Pacifisto, kiu tion potencvoĉe manifestis dum la milito... Verkisto de brilaj noveloj, de profundsencaj fabeloj, de ĉiam alitemaj kaj aliformaj, kaj ĉiam perfekte artistaj romanoj. En liaj eseoj li pruviĝas klarmensa filozofo kaj certjuĝa kritikisto. Kaj ĉio ĉi baziĝas sur eksterordinare larĝkadra kulturo, sur fenomenaj lingvokapablo, sur tia altnivela intelekto, pri kia disponas nur la plej bonaj cerboj de Eŭropo.

Ĉu mi povus karakterizi lian verkistan sintenon pli trafe, ol se mi citas kelkajn frazojn el lia memkonfeso?

»Mi kredas, ke estas inde vivi. Eble tio ne havas celon kaj sencon; ĉar »celo kaj senco« estas homaj ideoj: la mondo ne bezonas ilin. La mondo estas pli ol

ĉio homa, mi kredas la mondon, ĉar mia intelekto ne ampleksas ĝin.

Kaj tamen mi kredas la intelekton, ke, ĝis kie ĝi ampleksas, ĝi estas fidela servisto de tiu Io, kiun ĝi ne ampleksas... Ĝi konstruu nian vivon: kaj kiel la versoj iĝos pli bonaj kaj ne pli malbonaj, se intelekto konstruas ilin (nur malantaŭ la arkitekto ja staru ankaŭ la mastro) — tiel, foje ni havu jam pli bonan vivon. Sensencajn teruraĵojn trairis Eŭropo (sensenca estis ankaŭ mia vivo) nun venu jam la Intelektto!«

»Mi estas hungaro: mia animo, mia sento ricevis heredaĵon, kiun mi ne forĵetas: la mondon oni devas ne malriĉigi, sed riĉigi. Kiel mi povas servi la homaron, se mi ne gardas en mi ĉiun koloron, ĉiun trezoron, kiu povas riĉigi la homaron? La hungaran koloron, la hungaran trezoron! Sed kiel stulta mi estus, se samtempe mi volus forpreni aŭ malfortigi alian koloron, alian trezoron!

Mi kredas la fratecon: la koloroj kune formas la bildon, la sonoj kune donas la koncerton. Nacio ne batalu kontraŭ nacio: sed kontraŭ tio, kio estas granda danĝero por ĉiu nacio: kontraŭ la spirito de l' subpremo kaj detruo!«

»Kaj mi kredas la pacon! Mi kredas la harmonion, kiun deziras la animo, la belon, post kiu krias la materio, la amon, kiun sopiras la popoloj. Mi kredas je la malfacilo, ke ĝi ne estas malebla! Se mi ne kredus ĝin, mi mem farus ĝin malebla. Peko, por kiu ne estas absolvo. Nur la kredo povas ĝin fari ebla.

Mi estas homo kaj mi kredas la homon. Eĉ ne la homon. La homo blinde

stumbladas, sed la mondo malfermas kaj sufloras liajn vojojn. La homo estas primitiva estaĵo, sed la besto estas ankoraŭ pli primitiva. Mi ne deziras beston, eĉ ne homon! Pli!«

**LA VERKO:** Ĉu vi foje jam iris dormi sola? Kaj kiam vi malvestis vin kaj via mano volis estingi la lampon sur via noktoŝranko, ĉu vi subite ne pensis pri tio, ke dum dormo via korpo kuŝos en la lito sendefenda kaj senpova? Kaj via cerbo kaj animo iĝos facila predo de la vagantaj songoj... Ĉar kiu konas la devenon kaj la potencon de la songoj? Kaj vi retiris malkuraĝe vian manon kaj vi luktis kontraŭ la dormo, ĝis ĝi venkis vin. Kaj la sobraj lumoj de l' mateno vin trovis senkomprene gapanta al la brulanta lampo... Kaj vi priridis vian noktan timon.

Ĉu vi jam vekiĝis el turmentaj songoj, pri kiuj vi ne havis klaran bildon, nur tion vi memoris, ke dum la songo vi estis en nekonata loko, kie vi tamen iris-venis kiel en via ĉiutaga kutima ĉirkaŭaĵo? Kaj ĉu dum songo neniam minacis vin mortaj danĝeroj? Kaj via vekiĝo estis peza, tortura, inkubsongo ne volis ellasi la predon. Kaj post la vekiĝo vi liberiĝinte karesis la molan kusenon kaj dum la tuta tago vi pli percepteme ĝuis la ĝojon de l' ekzisto?

Imagu: Elemiro Táborny, la heroo de la romano, havis songon, kiu daŭris de nokto al nokto. Dum la dormo li vivis alian vivon. En la taga vivo li estis sola, dorlotita, talenta, bela, pura filo de riĉaj, eminentaj gepatroj, dum songo li estis

mizera, malbela, perversa skribisto. Komence li nur malofte rememoris la sonĝojn, sed poste la rememoroj ĉiam pli kaj pli postule trudiĝis en la tagan vivon, venenante ĝian belon... Kaj fine la malfeliĉa Elemiro Táborny ne sciis, ĉu ne la nokta skribisto estas la vivanta homo, kaj ĉu ne la vivo de Elemiro Táborny estas la produktaĵo de ia falsa sonĝo? Kompatinda kalifo, kiu ne povas liberiĝi de sia nokta cikonikorpo! Komenciĝas terura lukto, senespera batalo inter la du memoj de Elemiro Táborny. Batalo, kiu povas finiĝi nur per katastrofo...

Ĉu fantasta romano? Ankaŭ! Kaj se vi timas rigardi en la abismojn de l' sorto kaj de via propra animo, legu ĝin kiel tian kaj post lego rapide forĵetu la libron! Vi legos spirretene interesan, komplikan historion, kiu eĉ por momento ne lasas vin enui.

Ĉu simbolo? Certe. Ĉu ĝi surmontras la dualismon de l' bono kaj malbono? Jes. Se vi estas riĉa kaj feliĉa, ĉu vi ne pensis foje, kiel formiĝus via vivo, se vi estus naskiĝinta en mizero? Aŭ se vi estas malfeliĉa, ĉu vi ne revadis pri la feliĉo, kiel pri paradizo, el kiu nur la hazardo ekzilis vin? Aŭ ĉu post grandaj eventoj de via vivo vi ne haltis momenton kaj ne pripensis: ĉu ne estis irebla la alia vojo, ĉu tio nepre *tiel* devis okazi? Ĉu ne surprizis vin la mistika duobleco de ĉiu via koncepto? Ĉu antaŭ via cerbo la mondo ne konsistas el antitezoj? Kaj se vi rekonis la duoblajn eblojn de via sorto, antaŭ gravaj decidoj ĉu vi ne sentas angoran premon de terura respondeco? Ĉu vi ne meditis pri la



maljusteco de tiu ĉi mondo kaj ne pensis pri tio, ke eble la alia mondo kompensas ĝin kaj restarigas la ekvilibron? »*Kiu scias, ĉu de ni ĉiuj, de ĉiu tera homo ne vivas tia duplikato, malluma silueto, en songo, sub la konscio kaj ie malproksime ankaŭ korpe, jes, korpe, en malproksima mondo, sur alia planedo? Kiu scias, ĉu ne estas tia transmondo ie en la spaco, malluma Pendant\**, malĝoja karikaturado de ĉi tiu maljuna tero? Aŭ eble eĉ ne tiel malluma, malĝoja? Ĉu ĝi eble similas la nian, nur la roloj estas intersanĝitaj?« Ĉu la romano simbolas la antitezan formon, en kiu ni vidas la mondon, ĉu la duoblan eblon de ĉiu homa sorto, ĉu tiun misteran transmondan egaligon? Jes. Ĉu ili elĉerpas la plenan signifon de la simbolo? Ne!

Ĉu vi ne sentis, ke la antitezoj ne devenas el la ekstera mondo, sed ili loĝas en via animo? Ĉu vi ne sentis la malbonon, kiu venenas viajn bonajn intencojn? Ĉu vi ne sentis, ke ie en la plejprofundo de via memo kaŝiĝas io aŭ iu, kiu inundas vin per ŝlimaj pensoj, kiu venenas viajn plej sanktajn sentojn kaj amarigas viajn plej feliĉajn minutojn? Kaj se vi luktas (vi certe luktas, ĉar vi estas bona kaj pura), ĉu vi ne sentas, ke vi luktas kontraŭ vi mem? Ĉu tiu ĉi fatala duobleco de via, de nia memo estas la temo de la romano? Jes. Ĉu ĝi estas la plej profunda senco de la simbolo? Mi ne scias.

---

\* Pendant (pandan) = duoblaĵo

La simbolismo estas la plej perfekta arto, ĉar ĝi estas neelĉerpeble riĉa. La Cikonikalifo estas perfekta simbolo. Unufoja legado ne sufiĉas. Ĝi ĉiam pli kaj pli profundajn profundojn malfermas al la gapanta okulo. Kaj ĝia profundeco dependas de la okulo, kiu volas ĝin sondi. Kun ju pli riĉa animo vi proksimiĝas al ĝi, des pli multsignifa iĝas ĝia simbolo.

**LA TRADUKINTO:** Liaj unuaj tradukoj aperis en la unua periodo de Literatura Mondo. La legantoj ekatentis: jam liajn unuajn tradukojn distingis eleganta stilo kaj bongusta elekto de la tradukotaĵoj; ili apartenis al la perloj de la hungara novelliteraturo. Lia unua volumo, la traduko de la plej sukcesaj Karinthi-noveloj (Norda vento) jam montras lin eksterordinara stilisto. Sed la kulminon de lia traduk-arto signas la *Cikonikalifo*. Nemultaj tradukaĵoj ricevis tiom da favoraj recenzoj, ankaŭ la Akademio rekompencis ĝin per laŭdo.

Se mi volas karakterizi la stilon de Bodó, kiel ĝian ĉefan kvaliton mi povas emfazi, ke la lingvo de tiuj ĉi tradukoj estas *vivanta Esperanto!* Dum lego oni neniam rimarkas, ke ili estus skribitaj en »artefarita« lingvo. Pli grandan laŭdon mi ne povus diri pri esperantista tradukisto. La esperanta stilo ankoraŭ ne estas plene ellaborita. La tradukanto devas de frazo al frazo reverki la tekston. Se la tradukanto estas talenta, li ne *tradukas*, sed *rekreas*. Sed tiaj tradukistoj estas tre maloftaj en Esperanto. Se iu bone-malbone ellernis la gramatikon, akceptis ian oficon en esperantia societo, eble gvidis kelkajn

kursojn, li tuj sentas sin rajtigita traduki. Nu, estas tiel facile traduki Esperanten! Kaj ili ne rimarkas, ke nur *malbone* traduki estas facile! Multaj el niaj tradukistoj genie scias forigi ĉiun apartan belon, ĉiun guston kaj sukcon de la originalo kaj dronigas la tekston en ian senespriman, monotonan *platecon*. Ne estas do mirinde, se la publiko ne ŝatas la tradukaĵojn kaj preferas la »klaran, simplan« stilon de certaj modaj originalaj verkistoj. (Mi ne atakas la originalan literaturon, vidu mian ĉi rilatan diskut-artikolon en Literatura Mondo.) Kaj oni ne rimarkas, ke tiuj ĉi originalaj verkistoj ne *venkis*, sed komforte *evitis* la malfacilaĵojn!

La stilo de Bodó atingas perfektecon, kiun oni povas akiri nur per konsciencia tradukado, per pia amo al la lingvo, per profunda trasento de la spirito de ambaŭ lingvoj. (Tiun ĉi lastan oni ne povas lerni, ĝin aŭ oni ricevas donace ĉe la lulilo, aŭ oni neniam povas akiri. Ankaŭ la tradukado estas arto, kaj ne ĉiu naskiĝas artisto. Tion oni ne devus forgesi, kiam temas pri nia literaturo, kie svarmas la diletantoj.) Por ilustru lian arton, mi nur mallonge mencias lian *naturan logikan vortordon*, lian saĝan ŝparemon pri la malsimplaj verboformoj kaj pri la uzado de la afiksoj (anstataŭ »bonega« aŭ »boneca« li uzas »bone bona«, anstataŭ la nemulte imagiga »profundega« la multe pli espriman »profunde profunda«), la klarecon, glatecon de lia stilo, kiu esence estas la supro de la plej rafinita arto, kiel la plej pura blanko komponiĝas el la

buntaj koloroj de la ĉielarko. Ekzemple kiel sprite li prezentas la rapidan, engluteman parolon de kafeja kelnero:

»— Alportu botelon de ĉampano.

Mi p'tas 'um'le. Kian ĉampanon vi b'volas or'ni?«

Por doni gustumon pri la Bodó-a stilo mi citas parton, en kiu Elemiro Táborny priskribas sian onklinon:

»Al mi ĉiam ŝajnis, ke ŝi estas kvazaŭ el arĝento. La haroj sur ŝia eta kapo estas erarige arĝentaj. Ŝia vizaĝo estas tiel subtila kun la delikate blanka koloro, kun la diskrete brilanta rideto, kiel arĝenta filigranaĵo; kaj la brilo de ŝia rideto estis brilo de arĝento, kaj pli puran arĝentan sonoron, ol ŝia voĉo, neniam mi aŭdis. Sed la plej arĝenta estis ŝia animo; kaj ŝia voĉo: kvazaŭ la sonoro de ŝia animo. Ŝajnas al mi, kvazaŭ eĉ la vorto: *onjo*, kiel ni nomis ŝin hejme, aperigus imagon de nerezisteblaj, mallaŭtaj, arĝentaj briloj kaj sonoroj, eĉ se oni nur pensas pri ĝi. Mi vere apenaŭ opiniis, ke ŝiaj haroj pro la aĝo estas tiel blankaj; ŝi estis juna, delikata kaj ĉarma, eble arĝentite ŝi naskiĝis, kiel ia feino; mi eĉ ne imagis la feinojn alimaniere, ol ŝi aspektis, tie malantaŭ la pura tablotuko, la freŝa kremŝaŭmo kaj la arĝentaj kuleroj brilantaj de la matena suno.«

La Cikoni-kalifo — en sia esperanta formo — iĝis *gemo* de nia literaturo, kiel ĝin nomis unu el niaj plej sagacaj kaj inteligentaj kritikisitoj: s-no K. R. G.

Sturmer. Jam estas tempo, ke ni rekonu niajn *verajn* valorojn!

## Hilda Dresen

»Sub frosta norda krusto floras  
Kaŝitaj sentoj en anim',  
Hilda Dresen — padus' odoras  
Super degela marĉa ŝlim',

Nun, aŭdu, sur la lir' sonoras  
Sudlande arda koresprim',  
Kaprica ritmo, sorĉa rim':  
Marie Under ardfosforas...«

*(Kalocsay: Rimportretoj)*

Renkontiĝo de du delikatsentaj poeto-virinoj, poetino kaj tradukistino, kiu pruviĝis ŝia inda interpretanto; tradukistino, kiu sinofere eksonigis interesajn, modernajn poetojn de sia patrujo; tradukistino, kiu dum la tradukado kreskis je signifa originala esperantista poeto! (Lastatempe ŝi aperigis ankaŭ originalajn poemojn tre atentindajn.) Rea pravo, ke la tradukado estas vera lernejo de la poeto.

La verso en nia epoko montras nekontestablajn simptomojn de disfalo. La procedo, kiu la version apartigis de la muziko kaj gvidis al la preskaŭ proza *libera verso*, minacas la vivon de la verso. Nuntempe ĉiu poeto batalas *kun* la verso, aŭ *kontraŭ* ĝi: kiu scias, kion rezultas tiu ĉi batalo, tiu ĉi *krizo* de la, verso? Estas mia firma konvinko, ke la verso ne malvenkos.

La eŭropa literaturo estas unueca kaj nedividebla, ĝiaj kulminoj kaj krizoj ĉie identas. Sed estas fakto, ke la krizo ne estas tiom aktuala en kelkaj »malgrandaj literaturoj« kiom en la literaturoj de la grandaj mondlingvoj. En tiuj ĉi malgrandaj landoj la poetoj ankoraŭ ne perdis la kontakton kun la popolo. En ili la spirita vivo forte fermentas, ilia kulturo staras antaŭ radikalaj ŝanĝoj; en tiaj kultur-transformaj tempoj la poezio trovas sian vojon al la publiko kaj ĝi subite ekfloras. Ĉar la krizo de la poezio estas nur ŝajna, la sentempa poezio vivas sendepende de historio kaj kulturo, kaj inter favoraj cirkonstancoj ĉiam trovas siajn elektitajn adeptojn. Nek la poezio, nek la verso estas ja submetitaj al krizo: la publiko vivas sian krizon, gustan kaj spiritan.

En Estonlando oni ankoraŭ legas poemojn, en Estanlando oni eldonas esperantigitan verslibron.

Maria Under estas denaska lirikisto. Ŝia liro ne estas multkorda, sed ĝi estas sonoranta kun delikata vibro. Nordaj pejzaĝoj, nordaj kreskaĵoj, paduso, siringo, astero, nordaj kaj noktaj stratoj, nordaj belo kaj tristo inundas tiujn ĉi

versojn. Tamen ŝia tuta poezio estas *heliotropa*: Kun pieca avido ŝi turnas sin al la vivo, al la *suno*. Tiu ĉi norda sopiro al la viva — pli klare sentebla en ŝiaj fruaj poemoj — manifestiĝas ankaŭ en ŝia prefero al la sudaj versformoj: soneto kaj tercino. Kaj en la froste pala lumo de helaj noktoj ekfloras sude la sopiro en kultura erotiko:

Trankvilon nia sango plu ne trovas,  
Ardegas deziregoj en la kor'.

Ho, noktoj lumaj, ĉenoj, el arĝent':  
Ho, noktoj lumaj ĝis malfrua hor',

Nek maro, nek ĉiel' nun dormi povas,  
Sekrete en la silka sin' de l' floroj  
Vekiĝas tremetante bonodoroj,  
Fabelojn kantas akvoj en silent'.

Karesas harojn orajn vent-ektuŝo,  
Okuloj brilas pro mister-abundo,  
Flustradas songôjn tero nun sen vort'.

Kaj ĉiam pli purpur-ruĝiĝas mia bulo,  
La plenmaturajn kisojn nun ĝis fundo



Dekisi estus super ĉies fort'.

Senĉesa sinsekvo de ekstazaj himnoj al amo, vivo, sopiro jubilas en la poemoj prenitaj el la du unuaj volumoj de l' poetino (*Antaŭflorado* kaj *Sonetoj*). Sed poste, subite, la sopirpurpuro nigriĝas kvazaŭ koaglinta sango.

La koro ardas, kvazaŭ ĝi estus nun festo ĝoja, festen' solena,  
Sed efektive ĝi estas brulo, perc' terura, turmentoplena.

Mi volus kvazaŭ en rozarbuston min ĵeti en pasio-flamojn,  
Por ke kruele sangigu dornoj, dum pluv' petala, nun miajn manojn!

Kaj dum feliĉo senguste naŭza, dum granda ekstaz' de sinturmento,  
Elverŝi plenan venenpokalon, ĝisrande ŝaŭmantan de dub-fermento.

En la postaj poemoj ankoraŭ resonas kelkfoje la ekstaza vivĝojo, kiel ekzemple en la himne freŝa *Kanto do ĝejunuloj*. Sed pli kaj pli profundiĝas la nuancoj, la poetino pli kaj pli turnas sin de la helaj, ĝojfloraj kampoj de korpa ĝojo al la profundaj ŝaktoj de la animo:

Sur folioj rustaj de saliko brue la aŭtuno festas,  
Ju pli malgrandiĝas vi, des pli granda nokto estas.  
Nuda en la Absoluto, vi: estas nur senlim' kaj eta koro,

Tra mallumo densa ĝi ardetas kvazaŭ la aŭroro.

Kaj kun sugesta, preskaŭ mistika forto, sentigante per mirinda konjektigo la tutan homan sorton, kulminas ĉi tiu poezio en la mallonga, sed potenca poemo: *Mortemulo*.

La mondbrolo kaj la postmilitaj suferoj la reageman poetinon forlogis de la prikanto de individuaj sentoj kaj tristoj. Kaj eble ne ĉiam je la avantaĝo de ŝia poezio. Sed ankaŭ inter ĉi tiuj poemoj troveblas nerezisteble fortaj: el ili licu al mi mencii la *Antaŭurbon* kaj la *Kadukulejon*.

Sed mi ne intencis detale analizi la Under-an poezion, mi aldonas nur, ke la esperantaj versoj de la tradukintino estas eminente bonaj. Ŝi estras la lingvon, ŝia ritma sento kaj rimtrova preteco estas surprizaj. Kelkfoje sentiĝas ankoraŭ la eta rigideco en la esprimkonstruo, kelkloke eble kun iom da fortostreĉo oni estus povinta forigi ŝtopvorteton, sed ĉi tiuj riproĉetoj, sensignifaj, estas faritaj kun la plej granda pretendo. La plejparto de la poemoj estas lingve, stile, esprimpove senriproĉa. La tradukintino certe estas unu el la malmultaj majstroj de la esperanta verso. Ĉu la elekto estas tute perfekta, tion apenaŭ mi povas prijuĝi, anstataŭ la baladoj mi prefere estus leginta pluajn lirikajn poemojn. Sed la libro certe enhavas tre belajn, kelkajn tute aparte belegajn pecojn, kaj montras al ni komplete tre interesajn trajtojn de tre interesa poeta individuo.

## Stellan Engholm

La unua impresio, kiu frapas la leganton de la Engholm-romanoj, estas la fundamenta lirikeco de lia verkista individueco. Esence li estas poeto kaj siajn dirotaĵojn de poeto li vestas en la mantelon de l' rakonto. Eksteraj eventoj ne multe okazas en liaj romanoj kaj eĉ pri tiuj malmultaj ni sciiĝas pere de la efikoj, refraktitaj tra la cerbo kaj animo de liaj romanherooj. Mi ne opinias, ke tiu ĉi lirika sinteno de l' verkisto rezultigus malhelpon, se temas pri verkado de romano, do verko esence epika. La mondliteraturo atestas pri kelkaj ĉefverkoj tiaspecaj. Sed tiukaze la laboro de l' verkisto ne estas facila: li devas, bridi sian lirikismon kaj teni ĝin firme en la ĝusta direkto kaj striktaj barieroj, li devas konstrui solidan realan fundon, sur kiu povas baziĝi la flirtema lirika fantazio. La manko de tia objektiva subkonstruo minacas la romanon per drono en malcertaj ĝeneraligoj, en sentimentala subjektiveco...

En sia unua romano, *Al torento*, Engholm ne povis tute eviti tiujn ĉi danĝerojn. La tuta kadro, en kiu liaj; ĉeffiguroj vivas, estas iel disfluema, nebula. Ŝajnas, kvazaŭ la verkisto ne havus kapablon sensi la eksteran ĉirkaŭaĵon. Liaj figuroj vivas en ia imagita mondo, teksita el sonĝoj kaj revadoj. Kaj estas pli bedaŭrinde, ke ankoraŭ la ĉefaj figuroj mem ne disponas

pri necesa vivo kaj realo. Ili estas tro pale, tro malprecize konturitaj. Kelkfoje la leganto havas la impreson, ke la verkisto kreis ilin nur por krei eblecon paroli pri siaj propraj pensoj. Kaj tio estas grava manko... La figuroj ne havas sian propran evoluon, ili estas pupoj, kaj tro videblas la ŝnuroj, per kiuj la aŭtoro direktas ilin. Ili ne havas propran dirotaĵon, ili parolas, kiel la aŭtoro diktas al ili. Tio rezultigas neverŝajnecon de l' dialogoj. Ekzemple mi tute ne povas imagi, ke la ĉefheroo, Karlo, juna terkulturisto kun malmulta scio kaj kulturo, kiu antaŭ nelonge fariĝis urba laboristo, povu paroli kun tiel subita inteligento, kun tiel akra, preskaŭ skolastika sagaco, kiel la aŭtoro volas kredigi al la leganto. La verkisto tute ne povas bilde sensigi la evoluadon de siaj figuroj, tial li starigas nin antaŭ similajn surprizojn. Sed la romanon tamen savas la sincere trasentita pasio, kiu travibras ĝin, la honesta klopodo por eviti la malkarajn efikilojn de l' sentimentaleco kaj la tre bona esperanta stilo. Tiu ĉi lasta atestas pri serioza laboro kaj tradukado. Nur konscienca tradukado povas ĉizi ies stilon tiel facile flua.

La dua romano, *Homoj sur la tero*, (gajninto da la konkurso de Literatura Mondo 1931.) jam montras nekontesteblan evoluon. Kiel tio ofte okazas kun komencantaj verkistoj, Engholm volis tro multon enŝtopi en sian unuan libron: siajn opiniojn pri socialismo, pacifismo, sian tutan mondpercepton... Nun li estis multe pli ŝparema, li lasis pli larĝan validiĝon por siaj figuroj kaj sin mem

li zorge kaŝis malantaŭ la rakonton. La herooj vivas en ĉirkaŭaĵo jam reala kaj iliaj konturoj estas bone distingeble, vivece skizitaj. La verkisto kreis figurojn, pri kies reala ekzisto eĉ dum momento ne dubas la leganto, figurojn, kies strangeco ofte surprizas, sed neniam seniluziigas. Engholm pripentras ĉiam nur simplajn homojn. Solecaj bienoj, vastaj arbaroj, freŝa fojnodoro karakterizas la scenejon de lia romano. Grandtorento, la plej proksima urbo, fremde kaj negrave siluetiĝas sur la fora horizonto. Liaj herooj estas ĉiutagaj homoj; bienuloj, forĝistoj, diligentaj mastrinoj, kiuj vivas sian ĉiutagan unutonan vivon plenan de laboro. Kaj la ĉefa persono de l' romano estas la bieno, la malnova familia korto, la tero, kiu indiferece rigardas la homojn penadantajn sur ĝi, la sin sekvantajn generaciojn, kiuj perdas kaj regajnas ĝin, sed al kies vivo ĝi donacas la celon kaj sencon...

Kvankam simplaj kaj similaj al la aliaj, la ĉefaj, figuroj de Engholm havas ecojn, kiuj iom distingas ilin de siaj ĉirkaŭantoj. Ili portas en si nevenkeblan deziron al sendependeco, ian rezignan kaj tamen turmentan senton pri neŝanĝebla soleco, ian nebulan, malsatan avidon por esti *komprenataj* de la aliaj. Ili multon ekprovas, multon forlasas kaj ĉiam ili havas ion, ĉu violonludon, ĉu legon de libroj, kio avertas ilin pri valoroj pli superaj, ol tiuj de la nura vegetada vivo.

Avo, patro, nepo, avino, patrino, kelkaj flankfiguroj estas karakterizitaj

mirinde trafe kaj individue, ilia reciproka interrilato estas analizata kun subtila delikateco kaj konsciencia precizemo. La simpatio, kiun la aŭtoro montras al siaj figuroj, ekkaptas ankaŭ la leganton, kies interesiĝon nenio rompas. Al ĉio ĉi pariĝas simpla, sed esprimpova lingvo. La kvalitoj de l' romano atestas, ke nia juna literaturo povas havi pri Engholm la plej multpromesajn esperojn.

## Jean Forge

A.: Kia libro en via mano?

B.: »Mr. Tot aĉetas mil okulojn« de JeanForge.

A.: Ĉu vere? Se mi bone rememoras, vi ne tre ŝatas tiun ĉi verkiston.

B.: Eraro. Mi ĉiam rekonis lian nekontesteblan talenton. Nur mi ne aprobas lian verkistan (ne miskomprenu, ne temas pri la homo) sintenadon kaj mi ne povas akcepti kelkajn el liaj principoj kaj celoj rilate la esperantan literaturon.

A.: Nu, kiel mi vidas el via plena enprofundiĝo, tio tute ne malhelpas vian ĝuon. Jam de du horoj vi nek vidas, nek aŭdas, nur legas.

B.: Kompreneble. Forge scias vekti, eĉ ĉiam pli streĉe stimuli la interesiĝon de la leganto. Tiu ĉi »Mr. Tot« ja disponas pri riĉa tiacela arsenalo: sensacia sprita inventaĵo, moderna hotelo, kiu per sia grandioza, luksa internacia vivo impresas kvazaŭ Babelo, belega virino, persekutita anĝelo, dungita demono, eksperimento de sinmortigo, revolverpafo, murdo, timinda savanto, teruraj planoj, laŭŝajne malzorga, babilema detektivo, eventokulmino, angora streĉiĝo, gasbombo, triumfo de l' detektiva genio, morto, reviviĝo kaj ĉiam movo, movo, kaj movo... Ĉu oni deziras ankoraŭ ion? Kaj la tuto estas surverŝita per moda garnaĵo: per iom nebula, al neniu malutila pseŭdopsikologio.

A.: Vi maljuste ironias. Ni vivas la epokon de la nuramuza literaturo, de la

detektiva romano. Kaj oni ne rajtas aserti, ke tiu artspeco estas malpli altkvalita ol la ceteraj. Demandu la librovendistojn, kiom da inteligentaj, kiom da altrangaj homoj legas tiun ĉi literaturon. La senindulge plu rapidanta tumulto de l' moderna vivo ne lasas tempon por mediti pri pli profundaj verkoj, kaj oni volas iom amuziĝi post la taga penado...

B.: Jes, »oni ne havas tempon«, tiu frazo respondas pri ĉio. Ho, por multaj aferoj oni havas tempon nune, nur por pensadi ne... Kaj ni vidas la brilajn rezultojn de tiu ĉi Rapido! ni vidas, kien gvidis nin la epoko de la tekniko, sporto kaj kino. Epoko, kies idoloj estas la freneze rapideganta Ŝoforo kaj la belkrura Filmstelo. Epoko, kiu ekzilis la puran Intelekton kaj la neprofitdonan Belon...

A.: Vi tre devojiĝis. Kiom ĉio ĉi koncernas Jean Forge?

B.: Ĉar li estas fidela filo de la epoko. Se li estus nur mezkapabla verkisto, mi ne multe atentus lian verkistan sintenon, mi simple ĝuus liajn amuzajn verkojn, ĉar ankaŭ mi havas horojn, kiam mi estas tro laca por pensadi... Sed li estas sendube tre bonkvalita talento. Al tia verkisto ne licas forgesi, ke la verkisto similas al la pastro, ankaŭ li havas sanktan destinton: li devas ĉiam montri supren, avertante, ke super tiu ĉi mizera vivo regata de la blindaj instinktoj ja ekzistas ia neefemera, ia absoluta Vero aŭ Belo... Kaj mi ne povas pardoni al Forge, ke li *intence* rezignis pri tiu destino (se vi volas konvinkiĝi



pri lia konscienco, legu la 51-an paĝon de la romano: Saltego trans jarmiloj), tion mi sentas kvazaŭ perfido kontraŭ la propra talento.

A.: Vi plagiatas el la libro de Julien Benda. Cetere la verkisto povas verki nur tian libron, kian la publiko aĉetas.

B.: Tiu »La trahison des clercs« (La perfido de la kleruloj) estas tre saĝa libro, mi rekomendas ĝian tradukon al niaj francaj samideanoj, kvankam mi ne ĉiam samopinias kun la libro, kiun cetere mi konas nur el kompendio kaj kritiko. Kaj talenta verkisto estas vera kameleono: kia ajn estu la gusto de la publiko, li scias vesti sian seriozan direnhavon en allogan kostumon. Ekzemplo: »La gefratoj de Napoli« de Franz Werfel. Laŭforme: aventura romano kun multaj eventoj kaj surprizoj kaj tamen kia interna travivaĵo, kia spirita ĝuo por la leganto!

A.: Nu, se vi komencas la teoriadon, neniam vi povas fini kaj mi jam vidas, ke vi volas mortbati min per surĵetitaj librotitoloj. Prefere diru al mi viajn impresojn pri la verkistaj propraĵoj de Forge?

B.: Laŭplaĉe. Unue liaj temoj. Tiu de la »Abismoj« estas banala amhistorio. Tamen la aŭtoro ĝin prezentas en tre interesa formo: la kvar ĉefpersonoj mem rakontas ĝin alterne. Tiu ĉi lerta artifiko tre vigligas la rakonton. La bazo de la dua romano »Saltego trans jarmiloj« ne estas tute originala, ĝi estas iom parenca al la »Tempomaŝino« de Wells, sed la temo estas tute diferenca, kaj

ĝia ellaboro estas sprita kaj individua. Per helpo de fantasta inventaĵo tuta domo kaj ĝiaj loĝantoj transiĝas en la tempon de Nerono. La renkontiĝo de la unua kaj dudeka jarcentoj rezultigas groteskajn kaj komikajn scenojn, kiujn la aŭtoro feliĉe ekspluatas. Nepre unu el la plej sukcesaj temoj en nia ĝisnuna originala romanliteraturo. Pri »Mr. Tot« mi jam parolis, ĝia temo estas ĝuste tia, kia certigas la plej grandan popularecon. Nun ni vidu liajn figurojn. Ilia ĉefa manko estas, ke ili ne estas individue karakterizitaj, ili restas nur tipoj. Sed tipojn Forge scias prezenti per mirinda fideleco. Ankaŭ je tio li estas multe pli perfekta en la du postaj romanoj, ol en la unua (Abismoj). Precipe tre bone sukcesas al li la pentrado de tipoj, ĉe kiuj li libere povas utiligi sian bonhumoran ironion. Ni pensu nur pri la ĉiam fumanta kaj ĉiam malordon kaŭzanta Tabakoviĉ, pri la pruda maljuna fraŭlino Snob, kiu inter la antikvaj romianoj subite forĵetas la maskon kaj transformiĝas je amfreneza demono, pri la malfeliĉa profesoro Sovaĝi, kies lingvajn teoriojn detruas la stranga idiomo parolata de la romianoj kaj kiu fine konsolas sin per tio, ke li fondas universitaton por instrui al ili la sole aŭtentikan latinan lingvon; kaj fine ni menciu la bonhumoran, boheman Viskarbeton, tiun ĉi ĉiam mallertan, ĉiam forgeseman detektivon, kiun ĉiu akuzas pri absoluta senkapableco en sia metio kaj kiu fine superruzas ĉiun, arestigas la friponojn kaj savas la minacatan Mr. Tot! Figuroj, kiujn la leganto ne povas forgesi.

A.: Kaj lia stilo?

B.: Facila, vigla, rulanta Esperanto. Ĝi estas tute senriproĉa en »Mr. Tot«, ankaŭ bona en la »Abismoj«, iom malpli sukcesa en la »Saltego«. Sed tion ĉi lastan jam sufiĉe kritikis la recenzistoj post la apero de la libro. Al la atilaj proprajoj de l' aŭtoro apartenas ankaŭ la febra maltrankvilo, kiu travibras liajn librojn. Ĉe Forge ĉio estas en movo, ne nur la okazintaĵoj, sed ankaŭ la animoj de liaj herooj. Ili vivas en ia pliintensigita, plistreĉita stato, kiu preskaŭ similas al la ebrio. Tial li ŝatas pentri duonkonsciajn homojn, pensu nur pri la ebria (kaj ne nur pro trinkaĵoj ebria) Mr. Tot, aŭ pri s-ro Kovalo, ĉefheroo de la Saltego, kiu vundiĝis ĉe aŭtomobilakcidento kaj kies malrapidan rekonsciiĝon la aŭtoro detaligas kun tioma ŝato. Ĉar tiu ĉi proprajo karakterizas ĉiujn tri librojn, en la leganto facile povas vekiĝi la nerajta suspekto, ke la verkisto ne kapablas prezenti sobrajn. figurojn...

A.: Tiu suspekto vere estus tute senbaza. Sed vi ankoraŭ ne diris, kun kiu el liaj principoj rilataj al la esperanta literaturo vi ne identigas viajn principojn?

B.: Nu, mi aludis la tendencon: fari nian originalan literaturon ĉefe nuramuzo, verki per plej simplaj stilo kaj lingvo, kvazaŭ la publiko konsistus ekskluzive el komencantoj. Laŭ mia opinio Forge tro malalte taksas la nivelon de nia publiko. Sed eĉ se li pravus tiurilate, oni ne devas forgesi, ke per la riĉigo de la lingvo, per la pliprofundigo de la enhavo la esperantista verkisto

laboras al la estonto de la esperanta literaturo.

A.: Nu, tiukaze — mi pensas — la libroj de tia »estontlaboristo« facile restos nevenditaj.

B.: Tio povas okazi.

## Nikolao Hohlov

### La tajdo

»De la musique avant toute chose...« — jen la moto de la poemlibro de Hohlov. Ĉu prave? Ĉu vere oni trovas en ĝi »muzikon antaŭ ĉio« sentimentojn apenaŭ illustreblajn per vortoj, korespondojn nemotiveblajn, eternan muzikon de efemere forglitantaj momentoj? Ĉu la aŭtoro estas disĉiplo de Verlaine?

Mi devas kontraŭdiri. Certe, multfoje nin kaptas dolĉe muzikaj sonoroj en ĉi tiuj versoj, sed la muziko en ili ne estas »antaŭ ĉio«. Ĝi estas sole subpentro de tre klare esprimitaj sentoj, tre akre konturitaj pensoj. Kaj kelkfoje la poeto ekbatas la kordojn krude, por akordoj laŭtaj kaj akraj, kvazaŭ alarmo aŭ veokrio.

»La lirikon mi ne kreas, min *obsedas* la liriko...«

diras la poeto pri si mem. Kaj la unua, vorto, kiu venas sub mian plumon parolante pri li, estas la vorta *obsedo*, Nun mi ekmemoras, ke ankaŭ Kalocsay skribas en sia rondelo pri li:

»La himnon kaman kun pasio  
*Obsede* kantis al ĉiel'...«

Ia obseda sopiro pulsas en ĉi tiuj poemoj. Sopiro je amo ĉasta kaj fidela, je amo flagra kaj volupta, je la rompiĝinta pasinto, je la marmore perfekta, neatingebla belo, je la grandaj homaj idealoj. Kaj ankaŭ ia obseda melankolio sidas sur tiu ĉi spita animo. Kaj la *tajdo* de lia poezio alfluas kaj refluas inter sopiro kaj rezigno, idealo kaj karno:

Mi levas mian kapon en ĉielon,  
Sed per piedoj staras sur la ter',  
Nur idealojn vidas kiel celon,  
Sed nutras min la krudreala ver'.

Sur montoj kreskas mia sorĉa floro,  
Sed en la valoj kreskas mia pan',  
Altiras la animon ĉiu foro,  
Sed ankre tenas ĝin la karna man'.

Kaj ĉi tiu tajdo, kiel li mem priskribas ĝin en la unua poemo, per senĉesaj ondobatoj sieĝas la rokon de lia animo. Kaj la ŝaŭmbolon de la batalaj ondoj akompanas »karmanjola fajfo de l' siroko kaj demoneca rido de l' siren'«.

Delikata, sed intensa erotiko vibras en la liriko de Hohlov. Ĝi estas tiu universala inundo de l' seksa sorĉo, en kiu forviŝiĝas la limoj inter karna sopiro kaj esteta plezuro, en kiu korpo kaj animo sin lasas porti senreziste per la

potenca vivrivero — fluanta en la morton. Eble plej klare oni sentas ĉi tion en la Luna Ebrio<sup>\*\*</sup>, kie la sorĉo simbolas la lunatikecon de la eterna amtentento:

Jen — ĝi brilas, mia luno,  
Virgomaska amlucerno,  
Nuda mammo el latuno,  
Iritilo de l' eterno...

Jen — ĝi trenas, pala torĉo,  
Tra l' cipresoj ombran langon —  
Kaj la tero sub la sorĉo  
Paroksisme verŝas sangon.

Jen — ĝi tiklas kaj sufokas,  
Estingante ĉiun honton,  
Jen — ĝi vokas, laŭte vokas:  
Serĉu, kaptu kunĝuonton.

Vivajn korojn ligas pare  
La magia lunsonato

---

<sup>\*\*</sup> La poemon mi citas ĉi tie nur fragmente. Laŭ mia sento: ankaŭ tiel ĝi estas perfekta peco, eĉ, eble pli perfekta, ol en sia kompleta formo. La lastajn du strofojn mi sentas nepre superflujaj.

Por oferi suraltare  
Al Eroso kaj Hekato.

Alifoje la sopiro je esprimo, kvazaŭ la erotiko de vortoj, la ebrio de meminterpreto diktas al li versojn, kiuj frapas niajn vangojn kvazaŭ spirego de ekstazo:

Miaj strofoj volus vindi sveltajn formojn de Venuso,  
La plastikon de statuoj de l' antikva kulta bel',  
Bronzan nudon de la landoj, simbolitaj per lotuso,  
Fantazian Eldoradon de la ravo kaj fabel'.  
Mian himnon al la karno, al patrino de l' spirito,  
Kantas ĥore la plej lumaj anguletoj de l' anim...

Alifoje la rezignacio pri la unua amo, pri ĉi tiu »unika floro«, diktas al li amaran spiton, vipajn vortojn kontraŭ si mem: ridinda Ahasvero, kiu vane serĉos la dolĉan animekvilibron de la unua feliĉo, vane pelos ĝin tra venenaj kisoj, delogitaj viktimoj, kalikoj vinaj kaj absintaj, »vizaĝoj kaj vizaĝoj kaj ciferoj«:

Baraktu sur la sablo de l' areno  
Kaj kapturniĝu kun kvikanta kri',



Maljuna, kompatinda arlekeno,  
De la pasinto sklavo kaj pari'.

Ĉi tiuj »vizaĝoj, vizaĝoj kaj ciferoj« tamen eksonigas kordon tie kaj: tie ĉi sur lia liro. Kaj, malgraŭ la iom kurblipla admiro al ĉi-tiuj pasemaj idealoj, momentaj ekplaĉoj, lia fantazio vestanta ĉion per belo, ĉiam trovas pri ili kelkajn frapantajn, kelkfoje ĉarme-petolajn versojn. Eĉ du neforgeseblajn poemojn. La unu estas la *Karnavala romanco*, kie tra la triviala ĵazbanda tumulto de dancantoj pasas fiero belulino, kvazaŭ vizio de marmorbela greka diino, kiun li

sekvis rigarde, sen dezir', sen espero,  
Kun la mano rigida ĉe l' kor'.

Kaj la alia — la *Vintra fabelo*, ĉi tiu bela, sonoriltinta idilio sub la frostblua vintra ĉielo en la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo, kie

... (li) veturas, aventuras, la ĉevaloj fluge kuras.  
Sub la stela miriad'.  
En sereno de l' ebena malaperas la fadeno  
De la glata vintra voj',  
Mia Nita, am' subita, de la frost' ebriigita

## Alpremiĝas en la ĝoj'...

... kaj tiel plu, ĉiam kresĉende, ĉiam pli vigle, pli freŝe, pli muzike, ĝis la fino:

Unu suno, unu junu, la unua febra kuno

Kaj magia stelpoem'...

Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita

Ĉion kronas per alpem'!

Kaj tamen, — li sentas sin ekzilita en la mondo de la natura ĝojo de knabino; li vivas ermite en sia propra mondo, al kiu ŝin ne povas gvidi vojo. En ĉi tiu transcenda mondo li eble ĉiam ankoraŭ provas larmverŝe revivigi tiun »unikan floron« velkintan, kaj, (en la koro — amara obsedo, en la haroj — tro frua arĝent') li demandas sin:

Kial longe li sidas vespere

Super iu malnova portret',

Kaj, statue-senmova ekstere,

Perdas larmon en peza kviet'?

Kial nokte marŝadas sur strato,

Kun kolumo levita, sen cel',

Per la paŝoj de hom-aŭtomato,

## Sub albrove tiritita ĉapel'?...

Sed subite kia pugnobato sur la kordojn! Jen, »el nekonataj, ŝlimaj abismoj de l' animo« kantas la bardo en nia epoko. La tempo ne favoras la poezion. Baraktas la mondo! Kaj la poeto, kies liro estis agordita por milda, mola muziko de jen melankoliaj, jen petolaj sonoj de la sentema memliriko, nun estas obsedita de la komuna mizero, kaj antaŭ liaj febraj okuloj fantomaj vizioj galopas for: sangaj standardoj, falintaj gilotinoj; lin inkubas grincado de dentoj, metalo de fanfaroj, stertoroj, veoj, lamento de ploristinoj:

Analojn postlasitajn de gentoj kaj prauloj  
Mi sentas en angoro tra tempo kaj nebuloj,  
Antikvaj krimoj pete al ni etendas manojn  
Kaj forgesitaj lingvoj malbenas la tiranojn...

La tuta, senĉesa sinsekvo de krimoj, kiun oni nomas mondhistorio, inkubas en la tondraj strofoj de poemo *Eŭropo*. Kaj montrante per fingro al la nuda »krimulin' Eŭropo« li elkrias, fandante ĉiujn malproksimojn en profeta ekstazo:

Aŭskultu do, Azio, mamnutristino nia,  
Afriko sfinkse muta, tribar' Oceania,

Ĝemela kontinento de ambaŭ Amerikoj,  
Kunfratoj de l' estonto kaj dumaj malamikoj  
Aŭskultu kaj konfidu la jam proksiman horon...

Ĉi tiu grandioza poemtrombono estas unu el la plej potencaj Esperantaj poemoj!

\*

Granda promeso kaj multa plenumiĝo estas tiu ĉi volumeto. La aŭtoro sentas la lingvon en la pulso, perfekte estras la formon, liaj ritmoj estas freŝaj kaj sane pulsantaj, liaj rimoj estas novaj kaj ofte surprizaj. Li havas freŝajn ekpensojn, plaĉajn metaforojn. Kiu ne sentus agrablan eksciton, kiam li parolas pri »mentodora kaj karese dolĉa vento«, kiam en sia belega poempfresko »Duelo« li malkovras en la skermanta virino »mikson el tigro kaj mimoz'«, kiam li pasas tra la valo al la »lazura, sonvelura pastoral'«, kie linĉarmas:

Fragoj, framboj, ciklamenoj,  
Mentoj, kvastoj malvaj,  
Inter alnoj kaj fraksenoj  
Grizaj rokoj kalvaj,  
Fringoj, fringeloj,  
Pepaj kvereloj,

Zumeta bruo —  
Paruo!

Aŭ kiam li vizias por si la mortintan Sappho:

... Algoj ornamas la harojn, konkoj surŝutisla bruston,  
Kaj sur la liro rigida fingroj graciaj ripozas...

Aŭ kiam kun poeta fiero li diras pri siaj versoj:

Semo hodiaŭ ĵetita arbiĝos, proklamos la vivon,  
Super la koro kaptita formante ensorĉan ogivon...

Multon tian mi povus ankoraŭ citi, vortojn kaj versojn daŭre restantajn en memoro. Tamen mi devas ne prisilenti, ke ĉi tiuj belaj versoj ofte sidas en malpli bona poemo. Ĉi tiu volumo estas la unua volumo de la aŭtoro, kaj li ankoraŭ ne tute lernis *fari* la poemojn. Kie lia inspiro sufiĉis nur por sola ekpenso, aŭ por nuda temo, tie ne ĉiam li povis krei al ĝi la tute egalvaloran kadron. Tia manko de kompleta prilaboro restigis ekzemple en la *Luna Ebrio* la superfluajn strofojn, malpliigis la ĉarmon de la *Roza Ordeno*, *Maltrafa Pafo*, *Blua Kiso*, *Responde*. Sed kie li ne bezonis garnaĵon, ĉar la potenca inspiro sufiĉis por la tuta poemo, trenante kun si la poeton nekontraŭstareble, tie la poemoj estas vere neforgeseblaj travivaĵoj de la esperanta versleganto. Mi citu

el ĉi tiuj perloj: *Chante-claire, Sur la Slijeme, K. de Kalocsay, Dies irae, Al Julio Baghy, Duelo, Mia vojo, Karnavala romanoo, Vintra fabelo, Eŭropo.*

\*

Konturojn de interesa kaj profundsenta poeto rivelas ĉi tiu volumeto. Ĉi tiujn konturojn, kvazaŭ trabaron de granda kaj bela konstruaĵo, sekvantaj volumoj devus plenigi per brikoj, statuoj kaj freskoj. Ĉu ni ricevos ilin?

La poeto silentas. Li elkriis sian saluton al la heroldo matena:

Poeto kaj koko anoncu alvenon de ĉiu aŭroro!

Estas mallume en la tuta mondo. Plumba dormo ŝtopas la orelojn ĉie. »Tro frue, tro frue vi krias, ankoraŭ forestas la lumo, eĉ unu radio ne strias!«

»Egale!« Li kriis tiam al la »gaŭlo orpluma«.

Kaj nun?

Ĉu falis la trulo el lia mano? Ĉu, kiun tiel verve li komencis, eterne stumpa restos lia

»Monumento postlasita sur la vojo el Eden'«?

## K. Kalocsay

### Streĉita Kordo

Grandaj eventoj ofte okazas en silento. Kiam lastan somerfinon kune aperis tri Kalocsay-verkoj, laŭ ekstera sensacio tiu ĉi volumo ludis la plej modestan rolon. Ja kompreneble, la *Rimportretoj* vekis la naturan scivolemon de nia publiko, kiu same avidas pri intimaĵoj de siaj verkistoj, kiel ĉiu publiko sur la mondo; la volumo *Lingvo Stilo Formo* kontentigis tiujn, kiujn interesas lingvaj kaj poetikaj teorioj; ke ili estas multaj kaj ke la libro estas bonega en sia speco, tion pruvas la brila sukceso. Sekve ne estas mirinde, ke unu el la recenzistoj pritraktis la *Streĉitan kordon* nur *pretere*, menciante, ke dum verkado de pli grava verko (*Lingvo Stilo Formo*) Kalocsay eldonigis ankaŭ poemlibron! Grandaj eventoj okazas foje eĉ kontraŭ prisilento!

Sed tie kaj tie ĉi, en proksimaj vilaĝoj aŭ malproksimaj ĉefurboj, kelkaj homoj, ankoraŭ impreseblaj per la voĉo de l' Belo, subite ekatentis: okazis io ankoraŭ ne ekzistanta en nia lingvo kaj literaturo, okazis io *nova*: poemlibro, kiu meritas, ke oni lernu Esperanton nur por povi ĝin legi, poemlibro, kiu pridonacis nin per kristale evoluinta poezia lingvo; poemlibro, kies apero malfermas novan horizonton por nia literaturo: la epoko de l' diletantismo

definitive dronis en la pasinton.

## I

La apero de *Streĉita kordo* estos unu el la plej gravaj datoj de nia estonta literaturhistorio. Sed nun?

»Versojn oni ne aĉetas... «

Malmultaj estas la verslegantoj kaj multaj estas la esperantistoj, kiuj — eĉ se ili ŝatas versojn nacilingvajn — ne oferas la ne tro grandan penon, kiu estas bezonata, por legi en nia lingvo pli altnivelan literaturon. Do ne estos malutile, se mi iom pli detale konigos tiun ĉi libron. Mi ne volas fari sekan analizadon — ĉu oni povas analizi poemon sen ĝin murdi? — mi volas nur surmontri la belecojn antaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ estas tro timemaj por legi esperantan poemlibron. Pri tio mi sentas min iom rajtigita, ĉar mi havis la feliĉan okazon esti inter la unuaj, kiuj ekkonis tiujn ĉi poemojn, inter la unuaj, kiuj aŭdis ilin, laŭtlegetajn per tiu individua, velura voĉo, kiu impresas, kvazaŭ ĝi venus ne el la gorĝo, sed el la koro. (Kalocsay estas sendube la plej kompetenta interpretanto de siaj poemoj.) Se nur unu el la legantoj de tiuj ĉi linioj iĝos ema preni en manon tiun ĉi ĉefverkon de nia poezio, mia laboro ne maltrafos sian celon; kaj se al unu el tiuj, kun kiuj fratigas min la adoro de l' Belo, miaj linioj malkaŝos belecon senrimarke preterpasitan: mi sentos min feliĉa.



La verkon komencas la sentitola

*Prologo*

Grandioza uverturo! Kun la jam trankviliĝinta rezigno de l' matura viro la poeto rigardas sian verkon iom fremde kaj indiferente. La rilato inter la poetoj kaj siaj verkoj similas al tiu inter patro kaj filo: la patro generas ilin el la plejesenco de sia memo, konstruas ilin el la karno kaj sango de sia animo kaj kiam prete forŝiriĝas de li la verso, samtempe ĉesas ilia kuneco: la verso komencas vivi sian propran vivon. Kaj okazas, ke ili post jaroj foje renkontiĝas kaj jen, la patro trovas sian idon tiom plenkreskinta, tiom fortikiĝinta, ke li preskaŭ ne rekonas lin!

Ĉu sentojn tiel povis mi ekzili,  
Ke min ne tuŝas jam ilia trem'?'  
Ĉu tiel povas mi min malsimili,  
Ke sen kompren' mi miras pri poem',  
Kiun mi kantis iam larme, sange?  
Ho, jes ja, tiel estas, eĉ se strange.

Kun la duba supereco de l' filozofemo, kiun la aĝo kunportis, la poeto dissendas la trilantajn tintojn de l' kordo trostreĉita de l' ŝaŭmanta Juno: kaj en

tiu momento lin plenigas ia liberiga sento: forĵetante sian pasinton, sian estintan memon kiel balaston, li kreskigas al si flugilojn por leviĝi al ĉiam pli altaj' regionoj.

La libro dividiĝas en sep ciklojn. La unua titoliĝas:

*Eĥo de l' forta voko*

Tiu ĉi ciklo enhavas la esperantismajn poemojn de Kalocsay. En ili li montriĝas disĉiplo de Zamenhof, kaj en la koloro de la poeta voĉo, kaj en la fiksado de siaj idealoj. Kaj vere, neniu povas esti poeto en Esperanto, kiu ne fermis la zamenhofan *fortan vokon* profunden en la koron. Kio la Fundamento por la lingvo, tio estas la poemoj de Zamenhof por la esperanta poezio. Kaj kiel freŝe impresas la leganton la ĉi temaj versoj de Kalocsay post la senanima muelado de senvivaj, diletantaj zamenhofiadoj de fuŝpoetoj! Eĉ kie li ankoraŭ ne majstras la materion per la pliposta supereco (Jam kreskas la semo!), kia evoluo, kia pliperfekteco de l' formo kontraŭe al la ĝistiama »verda poezio«! En tiuj ĉi poemoj la esprimiloj de l' poeto estas ankoraŭ modestaj, sed jam ankaŭ ĉi tie montriĝas la fortaj flankoj de l' pli posta Kalocsay. Ekzemple en la supre menciita poemo li jam brilas per sukcesa ekfino de l' verso, kapablo ne tre ofta ĉe poetoj kaj tre karakteriza pri Kaloosay:

»Kaj via stel' per sia verda hel'  
Paligos ruĝan lumon de la Marso!«

Kompreneble la esperanta vivo konsistas ne nur el himnoj, ĝi havas ankaŭ siajn *amarajn horojn*. Al tiuj horoj ni dankas unu el la plej fortaj kaj sincertonaj poemoj de nia literaturo. La poeto sopiras je eĥo, kompreno, koro: kaj ofte li trovas nur la kolektan manion de korespondemuloj, la harfendadon de ĝisostuloj kaj la plej doloran: la indiferentan nekomprenon. Poeto sen popolo! Sed la amara horo flugas for triumfe

»La Forta Vok', en ĉiuj regionoj,  
Resonos en la kor' de junaj legioj.«

Ĉi tiu ciklo enhavas ankaŭ poemojn ĉizitajn kun brila tekniko. Kaj, ĉar ili fariĝis la plej konataj kaj popularaj versoj de l' poeto, ne estas mirinde, ke multaj prezentas al si Kalocsajn, kiel nuran lingvo-ĵongliston. Nenio estas pli falsa, ol tiu ĉi opinio! Se la leganto ne lasas sin narkotigi per la timige perfektaj armiloj de l' moderna verstekniko, li ĉiam trovas ĝuon ankaŭ por la intelekto, ne nur por la orelo. Sufiĉas, se mi aludas la potencon, prafortan *Kongresan runon* aŭ la parencteman *La renkonto de kantoj*. Estas en la ciklo du poemoj, kiuj videble ambicias la ludon pri la formo: la *Sonorilludo* kaj la *Versoj leoninaj*. Sed ĉu sen ili ne estus multe pli malriĉa nia poezio? Se mi volas

neesperantiston konvinki, ke la tiel nomata »artefarita« lingvo kapablas por poezio, mi laŭtlegas unu el tiuj ĉi versoj. Kaj la nekredema Tomaso ĉiam konvertiĝas!

Se mi legas tiujn ĉi versojn, ĉiam venas en mian kapon ideo pri juna knabo, kiun surprizas la noveco de l' impresoj pri sia propra korpo: liaj membroj malkaŝas por li mirklajn revelaciojn, li provadas ilin, eĉ en la plej fantastaj gestoj. Estas nia lingvo, kiu sin provas en tiuj ĉi versoj, tial ĝi ĝojas tiom pri sia korpo, la formo. Sed tiu ĉi korpo jam fermas ensorĉite la magian trezoron: la animon de l' poeto!

»Fari kastelon el oro de revoj, sopiroj de l' koro  
En la aera lazur' estas belega plezur'!  
Brilas per suno la muroj, ĝis nuboj atingas la turoj,  
Ĉambrojn en luksa ornam' iras Estrino, la am'.«

La ciklon finas soneto: *Th. Cart mortis*. Pri ĝi s-ro L. N. Newell diris en sia recenzo: »poemo laŭmenda kaj nepersona.« Mi ne povas konsenti tian juĝon. Per kelkaj simplaj, sed koncize efikantaj vortoj sentigas al ni tiuj ĉi 14 linioj, kion la »Granda Veteran« signifis al nia movado. Kaj la tutan trateksas la varma funebro de l' kompata ĉagreno. La finaj tercinoj tiel perfekte »elsonas«, kiel ĉe Heredia-sonetoj:

»Konfuzo kaj senhelpe ni ĝemas sub ĉi plago.  
Sed por animoj grandaj la mort' ne estas fin'!  
Li pasis, ve, li pasis, sed restis lia Ago!  
Super la tombo ŝvebas, kaj plue gvidos nin  
Du praaj malamikoj, kiujn sub verda flago  
Mirakle li pacigis: Liber' kaj disciplin'!«

### *La enfalinta mino*

Kapricaj humoroj de l' juna viro, kiu falas jen en la malhelajn abismojn de l' plena pesimismo, jen en la plej sunĝojajn jubilojn de l' beata vivjesado. Juneco kaj mondĉagreno! kiom ofte ili jam renkontiĝis en la poezio! Sed la voĉo de l' »enfalinta mino« diferencas iom de tiu de la antaŭaj generacioj: ĝia pesimismo estas pli objektive motivita. La leganto aŭskultas al la voĉo de generacio, kiu vidis kaj mem partoprenis la mondmiliton. Kaj krom la versoj, en kiuj la poeto per petolaj rimoj ludas pri la ne troserioza individua ĉagreno, troviĝas poemoj, en kiuj ekvibras pli forta kaj dolora tono: tie la lingvo kaj esprimo fariĝas pli simpla, memvole rezignante pri la iloj de l' ekstera efiko, ambiciante impresi nur per la masiveco de l' ideo mem.

La ciklon enkondukas *Iras abiturient'*..., eta ĉefverko de forma perfekteco,

vivfreŝa rememoro kaj flirtanta fantazio. Kiu iam, forlasante la senzorgajn kaj senkonscie feliĉajn jarojn de l' studenta vivo, ekstaris sur la sojlo de l' Vivo tiom multpromesa kaj por momento rerigardis kaj subite sentis, ke la rozkolora memfido de l' junaj muskoloj iĝis iom malcerta pro la dubo, ĉu vere al monto kondukas la plua vojo aŭ al deklivo: tiu fermas tiun ĉi poemon, kiel trezoron en la koron!

Junajn virojn ofte obsede atakas la deziro: vagi malproksimen, sola, deĵetante ĉiun katenantan ligilon. Kutime tio estas natura kaj malespera lasta provo por eviti ĉies komunan sorton: la filistrecon. Se la okuloj jam malfermiĝis kaj la idealismajn revadojn de l' junulo la realo jam vundis morta, ektriumfas la spleno:

»Rezigni pri ja vana lukto  
(Feliĉon ankaŭ venk' ne portos),«  
(Maldolĉa kanto)

»Kiom utilas ja, al kiu plaĉas,  
Ke, jen, mi estas bona, kiel pano,  
Kaj mi sekiĝas, aŭ min mus' formaĉas?...«  
(Ribeletto)

La juna temperamento facile glitas en kontraŭajn ekstremojn. La melankolian seniluziigon sekvas spito, la spito rezultigas ian amaran, perfortan ĝojon, kiun elinterne protektas la natura inklino de l' juna korpo al la optimismo. El tiuj miksitaj radikoj elburĝonis la *Kanto de vagabondo*, unike freŝa floro de nia liriko. Kalocsay mem muzikigis ĝin kaj jen nova surprizo! Lia *prothee* diversforma genio malkaŝas al ni novan flankon: li estas talenta komponisto. La *Kanto de vagabondo* meritas la plej vastan disvastiĝon ĉe nia publiko ne tre kutimigita al bonkvalitaj originalaj Esperanto-muzikaĵoj.

Ĉu oni restas hejme, ĉu oni travagas duonan mondon, la fina konkludo estos la sama: oni devas veni al la nerifuzebila rekono, ke ĉiu neeviteble kaj definitive *sola* devas fari la vojon de la lulilo ĝis la ĉerko:

»Ĉu en ĉambreto, dum vespersilento,  
Aŭ eĉ en la tumulto de l' popol',  
Subite ne atakis vin la sento,  
Ke estas vi en sol', en surda sol'?»

La ciklon fermas du impete forttonaj poemoj. Liberaj versoj: nenia kateno, nur foje-foje aperas modeste kaŝiĝemaj rimoj. La *Homo*: potenca himno al la sinjoro de l' Tero, al la triumfa subjuganto de l' metalo, akvo, vento, fajro, al la

timinda ordonanto de l' maŝinoj, al la dolĉvoĉa kantisto de sonoraj melodioj, al la venkinto de l' Vivo kaj... krevantaj sonoriloj, ĉifoniĝintaj vortoj al la murdisto, al la *falinta* anĝelo kaj laca rifuĝo al la senkulpeco de l' naturo, al la

»... tragika muteo de l' ŝtonoj.«

### *AGLO KAJ KOLOMBO*

Pasiaj amkantoj plenaj de juna ardo. La tuta entuziasmo, la sindona adoro de l' unuaj amoj pulsas en tiuj ĉi versoj. Laŭ la forma ellaboro ili ne estas tiom perfektaj, kiom la pli postaj ampoemoj. Plurfoje la forto de l' pasio estas tro impeta kaj subpremas la artiston. Plurfoje la poemoj estas tro personaj, la artisto ne levas ilin al la nivelo de komune homa interessfero. Sed ankaŭ ĉi tie ravas nin la eleganta delikateco de l' esprimo, la facila kaj flua ruliĝo de l' ritmoj, la intensa, sed deca erotiko. Ankaŭ ĉi tie ni trovas brilajn pecojn, mi menciuj nur la lastan, la kanton pri la sorĉa, sonorila rido de l' amatino:

»La ĝoj' en mi jam estas vekiganta.  
Infan' ankoraŭ, sed infan' giganta:  
Destinis lin la Sorto por miraklo!  
Jam, se atakos la dolor' inside,



Per eta man' li ĝin sufokos ride,  
Kiel serpenton en lulil' Heraklo!«;  
(Ridu, kara)

### *Korprintempo*

*Maja idilio!* Festa posttagmezo de urbano. Saltante jubila vivĝojo pro la libera freŝa aero, la herba verdo, la ĉiela bluo kaj... pro la printempa amo. Triumfa panegiro de l' troplena Juno. La naturon Kalocsay rigardas per la avide malsataj okuloj de l' urba intelektulo, kiu la ne tre oftajn okazojn de l' ekskurso al la verdo ĝuas kiel ferion: ferion inter la griza monotoneco de l' vivo en la ŝtonarbaro. Dum ferio ni ĉiuj iom reinfaniĝas, des pli, se la maja amo dolĉigas ĝin. Kaj kio okazas, se du infanoj kunferias? Ludo! Ĉar la homo nur dum ludo povas esti feliĉa kaj la infanoj pli bone konas la vojon al la feliĉo... Knabaĝaj rememoroj vekiĝas en la poeto: forgesitaj ritmoj, delonge ne aŭditaj kantoj. La ritmo kaprice ŝanĝiĝas, la rimoj petole interplektiĝas: ludas ankaŭ la verso. Esperanto ankoraŭ neniam sonoris kun tia plena formarto; tamen samtempe kun tia facileco kaj fleksemo, kun tia preteco kaj samtempe kun tia senartifikeco. Unua kaj unika trezoro estas la lingvo de l' *Maja idilio*, unue ekparolas en nia lingvo la naive simpla kaj infana Ĉarmo.

*Duopa psalmo:* sentempa senvelka preĝo de geamantoj. Plena de moderna

maltrankvilo pro ebla elreviĝo en la estonto kaj klasike greka harmonio kaj, pureco de l' formo. Ĉiam renoviĝanta, ĉiam nova provo por eternigo de l' Sento, por haltigo de l' Minuto.

La unuaj kvar cikloj enhavas la pli fruajn poemojn de Kalocsay. (Escepte kelkajn pli malfruajn.) Ili respegulas la junan poeton. Nun la vojo gvidas, al ĉiam pli profundaj temoj kaj al ĉiam pli altaj suproj.

### *Vizaĝoj kaj pejzaĝoj*

Se ni foliumas la *Streĉitan kordon*, iom post iom formiĝas en ni la impresoj, ke ni ne legas poemojn hazarde apudmetitajn, sed ke ili kontinuas unuece. Ankaŭ la cikloj estas tiel ordigitaj, ke ili donas al ni la bildon de ĉiam pli larĝhorizonta evoluo. *La eĥo de la forta voko*: unua renkontiĝo inter la poeto kaj Esperanto, entuziasma ardo al la Nova Sento, amara seniluziiĝo, denova fido. *La enfalinta mino*: sopira rememoro sur la sojlo de l' Vivo, en du poemoj (Se ekbrulus..., Silente, nigre...) fulme ekbrilas kaj forvelkas amo juneca, ilin sekvas la maldolĉaj kantoj de l' trompiĝo, spleno, individua mondĉagreno, poste spita sinturno al la »farsa rimo«, al la »ĝojŝafideto« loĝanta en la koro, sed ree refalo en la solon, en la ĉagrenon, dum la senteman koron de l' trista poeto ektuŝas la komuna sorto (*Homo, Ve'!*). *Aglo kaj kolombo*, *Korprintempo*: nova amo, nova feliĉo. Sed la poezio de l' feliĉa amo estas unutona, ĉiu verso

volas finiĝi per la rimo: Mi vin amas! Tio estas neevitebla kaj tial la poeto rezignas pri plua, prikanto:

»Ĉu skribi pri l' am' papere,  
Per aĉa inko? Ja prefere  
Sur neĝo de viaj ŝultroj brilaj  
Per fajro de lipoj maltrankvilaj.«

La rigardo de l' poeto nun direktiĝas al la ekstera mondo. Komence la fenomenoj de tiu ĉi nova sfero resonigas kordojn en la interna mondo, en la animo. La poemo pri senespera amo de l' popoloj en aleo ekfrapas melankoliajn akordojn. Sed la poeto jam traktas la temon iel *elekstere*, iel superece: kun la, objektiveco de l' artisto.

La sekvantaj poemoj anoncas plenan forturniĝon de l' interna mondo. Ili raportas pri serĉado de temoj, vojoj, formoj, pri elprovado de ĉiam pli perfekta verstekniko. Ne estas do mirinde, ke inter ili regas la soneto, la formo plej malfacila, do plej avidinda. Pure parnasaj poemoj estas la sonetoj pri la jarsezonoj. Ĉi tie uzas Kalocsay la elizion de l' adjektivo (en la tuta libro nur unufoje):

»Last horojn nun vivas la granda Naturo«,  
eble por praktike suriri la vojon, kiun li aliloke konjektas tiu de l' estonto

(Lingvo Stilo Formo). La soneton *Printempo* mi trovas iom laca, precipe pro la ne tre sukcesa finiĝo. La aliajn tri mi opinias perfektaj pecoj. La soneto *Mondhaveno*: grandioza panoramo pri tondranta spirego de moderna Babelo, kolosa vizio pri homformikoj perdiĝintaj en la kaoso de l' teknikaj mirakloj, kaj fine apoteozo pri la trankvilo de l' kampoj, kun tia forto de l' esprimo, ke la finaj versoj longe elsonoras en la senfinon:

»Persekutate kvazaŭ de nevidebla skurĝo,  
Skuate de la febro de senkompala Urĝo,  
Kuradas ili: perdis la benon de l' Trankvilo...

Dum lace pro la vido mi fermas la okulojn:  
Mi vidas: en sunbrilo sur freŝajn terobulojn  
Kun gaja fajfo paŝas kampulo post plugilo.«

La vojaĝo al Finnlando inspiris la poeton pri du poemoj. En la ĝisnunaj versoj la naturaj bildoj ne estas fiksitaj al certa loko, ili restis ĝeneralaj. Sed en tiuj ĉi versoj la poeto starigas antaŭ siajn okulojn realan pejzaĝon. *Wallinkoski*: gvidas al la pinborderita mondo de l' finnaj akvofaloj. La poeton irantan laŭ la bordo de rivero superregas la legenda atmosfero de l' mirinda ĉirkaŭaĵo: sur la trankvilaj ondoj de l' rivero aperas vizio, Väinämöinen sidas en boato, la blonda Aino ridas sur la bordo, la aeron dolĉe tramigras la ama kanto, la sensoj

luliĝas en sorĉan songon... Subite la ritmo ŝanĝiĝas, la pacajn trokeojn anstataŭas brutalaj anapestoj anoncante la proksimiĝon al la akvofalo. Kaprice saltanta ritmo, riĉa frapado de duraj rimmarteloj prezentas al ni la miraklon de l' naturo.. *Sur la Saimaa*: la Saimaa estas rivero, kiu kunligas la mil lagojn de l' finna lagomondo, sur la lagoj estas insuloj, post la insuloj ree rivero, poste ree lago kun insulo... Kaj se vi staras sur la antaŭo de l' ŝipo, vi vidas, ke

»... en la blua helo  
Lagon kisas la ĉielo«

kaj vin atakas la neniam satigebla deziro: serĉi la fabelan landon de feinoj: la landon de l' feliĉo. Feliĉa esprimo de l' eterna nostalgio al la nova, nekonata kaj ĝuste tial mistera kaj altira:

»Eble tie, sur ĉi bela  
Insulet' la bord' fabela  
Nin atendas, ĝuste nin...«

En tiu ĉi ciklo kun brila armilaro ekparolas la ironio de l' poeto. *La kripla Pegazo*: akre, senindalge kaj sprite vipas la fuŝpoetojn, tiom oftajn en la movado. Dum ĉi tie Kalocsay celis nepre komikan efekton, la *Veoj pri la asonanco* enhavas iom da persona amaro. Ĝi estas dediĉita al certaj kritikistoj,

kiuj — eble pro nura lingvoteoria vidpunkto, eble pro individua malŝato — volas toleri en Esperanto nur purajn rimojn kaj estante surdaj al la poeziaj kaj lingvaj belecoj de la Kalocsay-poemoj, serĉas la kaŭzon de sia surdeco en la rimoj de Kalocsay. Komprenoble la poemo brilas per la plej perfektaj puraj rimoj!

En la *Ezopa fablo* ni retrovas la konsekvence kondamnan sintenon kontraŭ la militarismo. Anstataŭ la malespere dolora kaj profete entuziasma tono de l' junaĝo, la viro vestas sian prijuĝon en la simplan ironian mantelon de l' fablo. Ĉiu lernolibro devus enhavi tiun ĉi juveleton de nia literaturo.

La paralelaj sonetoj: *Familiopatro*, *Maljana fraŭlo* kun kruela reflektoro ĵetas lumon sur ambaŭ sortojn. Sed la parnasan *impassibilitê* jam trakolorigas ia kompatema kunsento. Kalocsay nur provizore estis adepto de l' parnasa skolo, li alproprigis ilian kulton al la formarto, sed rapide preterpasis ilin. La transiron al temoj pli proksimaj al la sentimenta vivo de l' poeto vojsignas la *Tragedieto*: sur batakampo trafas etan birdon la *stulta kuglo* kaj la soldatoj, kiujn krudigis la senfina batalo, per subita ekfulmo de l' kompatato demetas la malgrandan korpon en tombeton:

»Jen kuŝas kantisteto en la heroa mort'!«

Kalocsay amas la infanojn. Kiam li parolas pri ili, lia lingvo survestas ian

ĉarman tenerecon. Kaj li estas bonokula observanto. Kiam li prezentas la *Infanojn ĉe montrofeneŝtro*, ili staras antaŭ ni en sia plena realo, kun siaj infanaj ĉagrenoj kaj spitoj. La poemo estas tre konvena por deklamado. Kaj ĉi tie mi volas noti, ke preskaŭ ĉiuj Kalocsay-poemoj estas sukcese deklameblaj, se inteligenta artisto eksperimentas per ili. Jam estas tempo, ke ni aprezu niajn valorojn! Se iu kontraŭĵetos, ke nia publiko rekrutiĝas ĉefe el ankoraŭ neperfektaj esperantistoj, por kiuj kelkaj el tiuj ĉi poemoj eble estus malfacile kompreneblaj, mi povas respondi nur: unue ni ne tro malalte taksu la lingvokonon de nia publiko (moda malsano nuntempe!), due ni kutimigu la neperfektulojn al la ĝuo de la pli alta, do memkompreneble pli malfacila literaturo.

La koron de l' poeto trafis la antaŭvento de ia eksterordinara feliĉo. En la obsedo de tiu mistika stato li iĝas pli perceptema por la sorto de la aliaj. Li hontas pro la senpovo, kiam li vidas la *Palan procesion* de l' grandurbaj knabinoj destinataj por kor- kaj viv-ĝojmuellaj horoj en la fabrikoj kaj kontoroj. Nun per majesta himno sin turnas la poeto al la *Patrineco*. Kiu ajn nacia literaturo rajte povus envii Esperanton pro tiu ĉi poemo. La poeto venis tiel proksimen al la kompreno de l' knabinaj sentimentoj kaj eĉ de l' knabina korpo, kiel tio entute eblas por viro. Nek unu superflua vorto, nek unu pli malforta linio, nek unu pli pala bildo troviĝas en tiu ĉi senmakula panegiro. Ĝi

estas verkita per perfekta preteco de l' artisto, sed ĝia voĉo estas pura kaj simpla, kiel tiu de l' Biblio. La enteksita soneto estas aparta ĉefverko:

»Mallerte sian ŝarĝon sub la koro  
ŝi trenas time, kun ŝirmanta brako...  
Komika vid'... Sed super ŝi, el oro,  
Mi aŭreolon vidas en imago.  
Jen iras kontraŭ tempon de doloro  
Heroineto de la Sesa Tago.«

### *Ahasvero de amo*

La tuta ciklo formas *unu* poemon, en ĝi estas rakontita la historio de *unu* amo. Post la spritaj prologoj la heroo de l' poemoj plendas pro la malvarmiĝo de sia amo. Vane uzas la amatino sian plej potencan armilon, la larmon, vane alarmas denove la printempo, la heroo devas konfesi, ke ankaŭ lia amo ne evitis la komunan sorton de ĉiu amo: la enuon. Li ribelas kontraŭ tiu ĉi fato:

»... Kial la am', se ĝi ne povas  
Eterne daŭri?«

Sed jam ĉesas la hezito, li rapide decidas la disiĝon. Nun subita ŝanĝiĝo de l'



tono, la libera malligiĝo de l' koro elvivas sin en laŭtaj jubiloj. La heroo ĵetas sin en la diboĉajn plezurojn de l' libere elektitaj ĝuoj, sed baldaŭ li konsternite rimarkas, ke li ree estas katenita. Kun la sento de furioza senpovo li turnas sin kontraŭ la amo, lia subjuganto, kontraŭ la virino, la eterna malamiko. Kaj obsedas lin infera venĝemo: la virginan purecon li volas treni al la amgeheno, por ke:

»... .. Vizaĝo via ĉasta  
Iĝu virinvizaĝo kun peka mark' de l' Scio.«

Sed venĝo ne helpas la propran malfeliĉon. Kun simulita ironio, sed kun interna envio li rigardas la feliĉon de tiuj, kiuj saĝe kontentiĝas pri la konstruita nesto. Li sentas sin malbenita Ahasvero, destinita por

»Konstrui neston, sed neniam nesti«.

Lin tentas el la pasinto la bildo de l' feliĉo, kiun li mem disŝiris, sed vane:

»Sur mia koro staras skribo nigra:  
Lasciate ogni speranza, voi ch' entrate.«

Novan ekflamon de l' karno sekvas la pripento. La *bona amo* kvazaŭ varma talaro lin ŝirmis kontraŭ la furiozo de l' mondo kaj li perdis ĝin... Kun sincera

pentofaro, kiel la malŝpara filo, li revenas al la amatino, ĉar li rekonis, ke sole la kunfandiĝo en la pura amo povas alporti la savon, la liberiĝon, li rekonis, ke *unu* estas pli multa ol la *multo*.

Ĉi tiu ĉi *happy end* estas la definitiva solvo de l' problemo? Ĉu la amo ne signifas ĉiam nur katenadon? Ĉu Budho ne venis pli proksimen al la solvo, kiam li predikis la forturniĝon de *ĉiu* amo: El la amatino devenas la sufero, el la amatino devenas la timo; kiu tute forŝiriĝas de l' amatino, tiu ne suferas, ĉar kion li timus? La problemo, kiel ĉiuj eternaj problemoj havas plurajn solvojn. La poeto per la nesuperebla perfekteco de l' matura artisto prezentis la sian. Kalocsay estas sendube la plej profunda amkantisto de nia poezio.

### *Ebria ekvatoro*

La animo de l' poeto, plena de individua feliĉo, vastiĝas por surpreni la ŝarĝon pri la sorto de l' homaro kaj universo. Tiu ĉi ciklo atingas tian altan gradon de l' poeta esprimovo, tian filozofan profundon de l' sublima Penso, ke ĝi levas la poeton el la kadro de unu literaturo. Tiuj ĉi poemoj estas ne nur la perloj de la Esperanta poezio, ili viciĝas al tiuj, en kiuj la genioj de l' homaro priesploris la esencon kaj destinton de l' Homo kaj Mondo. Sentempaj kaj eternaj kiel iliaj temoj eternaj, ĉi tie ili fandiĝas en eternan formon. Kaj, kiel la plej profundaj akvoj, ili estas mirinde klaraj kaj, kiel la paraboloj de l' Biblio,

nesupereble simplaj. Ilia kompreno estas ludo por inteligentaj esperantistoj, kiuj sufiĉe bone konas la lingvon!, por tiuj estas bezonata nur atenta lego. La tuta mondpercepto de l' klera, eksterordinare inteligenta poeto estas densigita en tiujn ĉi poemojn. Kaj ĉi tie mi devas iom paroli pri tio, ĉu la pli supera intelekto, la multflanka erudicio malhelpas la sugestan forton de l' poeto? Multaj parolas kun prefera mencio pri la tiel nomataj »sovaĝaj genioj«, kiuj ne estas »libro-vermoj« kaj kiuj obsedkaptas la leganton per la kruda forto de sia *denaska pragenio*. Nu, laŭ mia opinio, se oni de pli proksime ekzamenas tiujn *sovaĝajn geniojn*, kiuj *vere* estas genioj, oni ĉiam trovas sur la fundo de ilia poezio nekontesteblan kulturon pariĝantan kun la denaska talento. Estas certe, ke la Kalocsay-poemoj malkaŝas al la leganto ne nur poeziajn kaj lingvajn belecojn, en Esperanto ankoraŭ neniam renkontitajn, sed ili donacas al la intelekto la ĝojon de pure spirita plezuro. Estas certe, ke Kalocsay estas nia plej inteligenta kaj klera poeto.

La kritiko ne multe atentis tiujn ĉi poemojn, unu el la recenzistoj menciis ilin, kiel poemojn kun »iom da kosma enhavo«. Ankaŭ al la pli larĝa publiko ili ankoraŭ ne trovis la vojon. La kaŭzon de tiu ĉi fenomeno mi trovas en ia konservativa malprogresemo. Oni kutimiĝis al la brila teknika riĉeco de l' pli fruaj poemoj kaj oni staras senkomprene antaŭ la nova tono, antaŭ la ŝajne pli simpla vesto. La rimoj modeste kaŝas sin akcentante ankaŭ per tio la pli

superan gravecon de l' direnhavo. Sed la simpleco ne signifas samtempe la malfortiĝon de l' esprimpovo. Eĉ kontraŭe! Ankoraŭ neniam sonoris lia nobla bronzo kun tia plena kaj potenca voĉo! Liaj »liberaj versoj« estas konstruitaj kun la plej rafinita arto. Sed la formo estas severe submetita al la servo de l' nuda kaj vera Penso. La artisto rezignis pri la popularaj iloj de ia ekstera efiko kaj jen, la penso, la kerno de l' poemo mem fariĝis formo! La naskiĝanta ideo ne pluserĉas la konvenan korpon, sed Ideo kaj Formo prete elŝiriĝas el la utero de l' poeta animo, la Formo obee sekvas la konturojn de l' Ideo...

Nun ni rigardu de pli proksime kaj aparte ĉiujn el la ok poemoj, kiuj formas la ciklon.

*Ekstaze*: la Katenoj memvole malfermiĝas, la Ligaĵoj aŭtomate defalas, la liberiĝinta Memo jubile fandiĝas en la Unikan Ĉion, perdas sin mem, sian volon, por retrovi ilin en la Volo Eterna, kiu vivigas la universon. Potenca panteista psalmo: festa feliĉo de l' sinofera solviĝo en la savantan *Pan*.

*Diboĉe*: facila ĝojkanto al la suna triumfo de l' mateno, soleca ekhalto inter la ŝtoniĝinte grizaj rigardoj de l' urbaj viroj, virinoj, rapidantaj al la ĉiutaga jugo:

»homoj rapidas  
en ĉies nazo: ringo

en ĉiu ringo: fadeno  
kaj la fadenojn tiras  
Sorto Mono Intereso«

Neniu rigardas por ekkapti la kison de l' suno, neniu sendas ekmiran, rekonan saluton al la aliaj: plenda akuzo kontraŭ la ŝtona kulturo de l' urba civilizo.

*Vizio sur la ponto:* iun vesperan someron la poeto staras sur la mezo de l' ponto, la obtuza mur-muro de l' urbo dronas en la vesperan krepuskon, la monotona ruliĝo de l' ondoj halucinigas antaŭ lin la senliman Tempon, kiun la rivero indiferece trafluis. Sub la apenaŭ eltenebla pezo de l' Eterno kaj Senfino la eta memo malfermiĝas al la terura Drivo de l' Jarcentoj, kiuj nun torentas tra lia jam preskaŭ dissolviĝinta kadro... Konvulsie li kaptas al la fera pontokrado por resavi sin en la estanton,

»en mian... jarcenton... mizeran...«

*Demande:* konsternita, impeta demando meze de l' tumulta svarmo de l' vivo, subita konsciiĝo pri ia mistera dualismo de l' memo, nekomprena, elekstera rigardo pri siaj agoj, pri si mem, pala, duba konjekto pri ebla ekzisto de ia kosma Spirito...

*Spite:* akra sinturno kontraŭ la *Pan*, rifuĝa ribela de l' *mi*, apoteozo de l'

atomo pasema, de l' *homo*, kiu per sia momenta ekzisto pridonacas la indiferentan, mortan materion per la koloraj briloj de sia eterne soifa, eterne malfermita Okulo.

*Efemere*: en tiu ĉi giganta odo ni retrovas la temon de l' antaŭa poemo, sed kun profunde tragikaj konturoj, kun silueto projekciita en la senfinon, la neniam estingebla deziro al la senmorteco manifestiĝas ĉi tie kun elementa forto. Ne *Pan*, la senpersona — do senpova eĉ en sia stulta potenco — minacas ĉi tie la memon per avida engluto, sed la pasema, bagatela *mi* triumfe vastiĝante donas al ĝi vivon kaj sencon!

»...ĥo mia penso, belege freneza sago kiun mi pafas  
en la malhelbluon de l' Nokto, ke ĝi flugu meteore  
kaj kun fajre triumfa ekbrilo anoncu ĉe l' sojlo de l' Senfino:  
Jen mi sendita de homo!«

Sed ve! vanas la ekstazo, vanas la venko! marŝas la terura, senindulga, nehaltigebla aro de momentoj (ĉu vi rimarkis, la kruela, martela frapado de l' dura, monotona ritmo per kia koloriga efekto sensigas ilian neeviteblan, fatgravedan ĉeeston kaj pason?) kaj manĝas kaj murdas la efemeran triumfon, kaj el la estonto elnigras la nepra certeco de l' fina momento... Ho! nur unufoje ekkapti, haltigi nur unu el tiu ĉi precize marŝanta armeo por deskui

»la ĉenojn de l' tirana Temp'«,

por plenigi per sentoj la obstine malluman materion, por freneze beatiĝi en la ebria danco de l' atomoj, por iĝi senco de l' leĝoj universaj... Kaj post la ĝiseterne streĉita pliigo de tiu ĉi unika momento jam estos indiferenta la neniigo, la kruela reakcio de l' blindaj fortoj...

Por tiuj, kiuj trakomprenis ĝian tutan signifon, tiu ĉi grandioza poemo estas la zenito de la ĝisnuna Kalocsay-poezio.

*Freneze:* decida militdeklaro al la surda, blinda egoismo, fortvoĉa alvoko por fratiĝi en la komuna sorto, por rimarki, adori la belecojn de l' tera vivo, por festi la liberiĝintan ĝojon de l' homo, kiu per la sklavigo de l' maŝinoj sin liberigis de la premo de l' laboro, alvoko por Universa Festo, dum kiu la poeto

»kun mortbrakuma, mondbrakuma gesto,  
«bria ekvatoro, ĉirkaŭprenas la Teron.«

*Duope:* monumenta epilogo, inda al la verko. Denova seniluziiĝo, denova konvinkiĝo pri la vanteco de ĉia ideala klopodo, denova rifuĝo al la »mondvalora Bagatel'«, la amatino, sed la fortikiĝinta fido de l' poeto jam transsaltas la abismojn de l' pesimismo: lia profunda saĝo ĝuste en la atoma feliĉo de l' duopo konjektas la ĝermadon de ia naskiĝanta Novo:

»En mondfluido plena de amara sal',  
Jen ni: komenca molekulo de kristal',  
Kaj ĉio, ĉio, jen, kun diamanta bril'  
Metiĝas ĉirkaŭ nin! Kaj kun facetoj mil,  
Kolorojn ravajn radiante en dispers',  
Kreiĝas ĉirkaŭ ni kristala Univers'!«

### **Rimportretoj**

Estas malfacila kaj ne tre danka tasko, kiun Kalocsay surprenis per la verkado de tiu ĉi libro. Estas ja memkompreneble, ke la publiko avide scivolos pri intimaĵoj de niaj plej konataj verkistoj, propagandistoj k.t.p. Kaj ankaŭ tio estas natura, ke ĝia interesiĝo pretere orientiĝas al la malfortaj, vundeblaj flankoj, de ĝiaj favoratoj... Sed la aŭtoron de tiaspecaj rimaj karakterbildoj minacas terura Scylla kaj Charybdis: se li centprocente kontentigas la senmaskigeman instinkton de l' legantaro, li — kvankam ne malbonintence — vundas kaj indignas la karakterizitojn (precipe, se temas pri esperanta libro: estas konata fakto, ke en Esperantujo la hipertrofia ofendiĝemo ne estas tro malofta fenomeno) kaj tio ne povas esti la celo de la libro; kontraŭe, se li uzas tro mildajn kaj mielitajn kordojn, amasigas tro laŭtajn laŭdojn, la ŝancoj por spritaj turnoj malpliigiĝas, la tuta libro dronas en monotonan ripetadon, sekve en



la plenan indeferentecon de l' leganto. Sed montriĝas ankaŭ tria danĝero: por eviti rajtajn plendojn tia verko laŭeble devas ambicii plenan kolekton de l' »steloj«, sed tuj anoncas sin la malfacilaĵo: kiel verki trafan karakterizon pri iu, kies agadon, karakteron oni nur konjektas el la malcerto de l' malproksimo, ĉe kiu la konturojn de l' bildo ne precizigas pli firmaj impresoj akiritaj pere de persona interkonatiĝo? Ankaŭ de tiu ĉi flanko minacas ia nebula ĝeneraligo kaj uniformigo, ia seka sistemo de skemoj ripetitaj.

La tasko estas malfacila, des pli ĝi interesas Kalocsayn, des pli li venkas ĝin per la suverena supereco de sia brila tekniko kaj neelĉerpebla poeta invento. Estas certe, ke kelkfoje ankaŭ li ne povis eviti iom pli ebenan reliefigon de l' profilo, iom pli lacan ĉizadon de l' verso: sed tio okazas nur malofte, ĉe tiuj poemoj, kiuj pretiĝis videble je mendo, kiuj do ne povis doni inspiron al la poeto. En granda plimulto do l' poemoj li triumfe solvis la problemon. Por li estis evidente, ke tiaj poemoj nur tiel povas gajni la batalon, se ili estas verkitaj en strikta kaj severa, formo, kiu disponas pri necesa impresiva forto de l' sensa efekto. Lia elekto feliĉe trafis la rondelon, formon abunde regantan en la mezepoka franca poezio, formon, kiu al la malfacilaĵoj de l' rigora tekniko parigas klaran kaj petolan ĉarmon, ludemon, naskiĝintan sub la hela ĉielo de l' Sudo. La tuta efiko de l' rondelo baziĝas sur ĝiaj rimoj, kaj la rimoj de Kalocsay estas bonegaj, ili neniam estas ŝtopvortoj, preskaŭ ĉiam ili diras ion

karakterizan pri la heroo, ofte la portreton skizas jam la nuraj rimoj mem.

Krom la perfekta formarto, la ĉefaj meritoj de tiuj ĉi poemoj estas: la eksterordinare lerta mano de l' poeto, kiu per kelkaj rapidaj penikstrekoj trafas la karakterizajn trajtojn de l' »steloj«, la iom bonintence ironia, sed ĉiam sprita humoro, ŝvebanta super la tuta volumo. Ne mankas ankaŭ la satiro, (nur tie, kie ĝi estas nepre necesa!) kaj tiuj partoj tiom sukcesis, ke ni povas nur bedaŭri la troan ĉi rilatan ŝparemon de l' poeto.

Pli detala analizado estus superflua. La Rimportretoj apartenas al la libroj, kiuj vekas malmultan pridiskutadon, sed des pli multan dumlegan ĝuon. Tamen por ion prezenti el la libro, licu al mi citi el la rondelo, kiu temas pri Barthelmeŝ, »la Faŭst-tradukanto«:

»Poemo ĉi, popola kanto  
Simpliĝis pli ol, per transporto.  
Barthelmeŝ — la Faŭst-tradukanto  
Ĵonglata per ludadas vorto.  
  
Kun da admir' en koro kvanto  
Legadis kiu per volforto  
Faritan Faŭston en retorto:  
Ĝin malforĝesos en konstanto.«

Kiu konas la Faŭst-tradukon, tiu kun komprena ĝuo rekonos la satiron, kaŝiĝantan sub la sprita imito de l' Barthelmess-stilo. En sia recenzo pri la Rimportretoj Barthelmess per malforta oklinia verso volis venĝi la rondelon. Se li estus spritulo, li estus farinta tion en rondelformo...

Kalocsay ne profetas senmortecon por tiuj ĉi poemoj:

»Facilsubtila rondelet'  
Per vent' forflugos kiel floko.«

La leganto havas alian opinion, li scias, ke kelkaj el la rondeloj de l' Rimportretoj triumfos pri la pasemo de l' aktualeco!

### **Lingvo, Stilo, Formo**

Kio klarigas la eksterordinaran sukceson, kiun ĉi tiu libro rikoltis en Esperantujo? Certe la avido, per kiu la esperantistoj sin turnas al rimedoj por perfektigi sin en la lingvo. Rea argumento kontraŭ la pesimismo de certaj personoj, kiuj arogas bone koni la espraantistojn kaj kiuj senĉese pledas por la kiel eble plej »populara« nivelo. (Nu, se mi volus esti malica, mi dirus, ke per la defendo de la »populara« literaturo ili defendas sian propran diletantismon. Sed mi ne estas malica.) La esperantista publiko ne volas resti

»eterna komencanto«, ĝi volas progresi: nur oni donu rimedon por lerni. Kaj la libro de Kalocsay perfekte kontentigas ĉiun scideziron. Ĝisfunda kono de la materialo, profunda intelekto, konciza, klara lingvo faras la libron nepre necesa por ĉiu, kiu volas sin perfektigi en Esperanto. Havante identan vidpunkton pri la pritrakitaj problemoj mi nur mencias la ĉapitrotitolojn de la riĉenhava libro. »La evoluo de nia poezia lingvo«, »La esperanta rimo«, »Pri la esperanta ritmo«, »Klasika ritmo en Esperanto« temas pri problemoj, kiuj apartenas al aparta studo pri la poezia lingvo de Kalocsay. (Vidu la ĉapitron: TRADUKOJ). *Sendemandaj respondoj*: Sprita eklumigo de kelkaj lingvaj demandoj. Oni bedaŭras nur, ke la *respondoj* ne estas pli multaj. *Esperanta elparolo*: Multe pridiskutita temo, kiu verŝajne neniam solviĝos definitive. Tamen la problemon mi ne trovas tre danĝera: ioma individua aŭ nacia nuancigo de la elparolo neniel malhelpas la komprenon. La elparolmaniero, kiun Kalocsay rekomendas, estas certe la plej modela kaj plej sonora, krome ĝi estas la plej natura kaj plej multe uzata. Nur en unu punkto mi ne samopinias kun Kalocsay: laŭ li oni elparolu ĉiam ĉiun vokalon *duonfermite*. Laŭ mia opinio tiu ĉi regulo havas unu escepton: se la *akcentan vokalon* sekvas *vokalo* aŭ *unu konsonanto*, oni prononcas tiun ĉi silabon ne nur *longe*, *tirate*, kiel Kalocsay ĝin konstatas, sed ankaŭ *malfermite* (bāti, véra, víro, parólo, múro). Tiu ĉi escepto riĉigas la vokalaron de l' lingvo kaj laŭ mia ĝisnuna sperto tute ne malhelpas la

komprenon. Ĉiujn aliajn prononregulojn de Kalocsay mi opinias ĝustaj, do ankaŭ la regulon de duonfermiteco pri tiuj vokaloj, kiuj ne apartenas al la supre menciita kategorio.

Pri la vortfaradteorio de Kalocsay mi devas iom pli detale paroli. Ĉi tiu teorio ŝajnas unuavide iom tro komplikita. Unu el la recenzintoj eĉ ĝojis pri ĉi tiu komplikeco, dirante, ke, dank' al ĝi, tre malmultaj komprenos ĉi tiun danĝeran — de li malaprobitan — sistemon. Kalocsay, kiam mi aludis antaŭ li ĉi tiun recenzon, ekridetis kaj diris: »Sed la teorio ja estas tre simpla! Komplikite kaj malfacile estas nur ĝin klarigi skribe.« Kaj vere mi vidis, ke tute ne perfektaj esperantistoj, kurslernantoj, komplete komprenis ĉi tiun teorion, kiam li parole ĝin prezentis al ili.

Mi opinias, ke ĉi tiu sistemo estas nerefutebla kaj tute konforma al la ĝisnuna lingvouzo. Krome ankaŭ tre simpla, ĉar ĝi superfluigas ĉiun derivregulon, laboras nur per la vortlogiko, pruvante, ke en Esperanto vortderivo kaj vortkunmeto estas esence unu kaj la sama.

Laŭ la klarigoj de Kalocsay jen mi donas ĝian resumon, esperante per tio vekti intereson kaj helpi komprenon.

La bazo de la teorio estas la *de Saussure-a* konstato, ke en Esperanto ĉiu vorto kaj sufikso kaj finaĵo havas difinitan radikkarakteron gramatikan (substantivan, adjektivan aŭ verban). Se en iu vorto la radikkaraktero kaj

finajkaraktero samas (samelementa vorto), la finaĵo estas pleonasma. En mala okazo (malsamelementa vorto) la finaĵo havas la funkcion de memstara vorto, donante sian sencon propran al la senco de la radiko. *Homo, bela, skribi* estas samelementaj *homa, beli, skribo* estas malsamelementaj vortoj.

En kunmetita vortkomplekso la lasta elemento estas la ĉefelemento, la antaŭa(j) elemento(j) estas la flankelemento(j). La ĉefelemento havas efikon al sia flankelemento tiamaniere, ke ĝi difinas ĝian gramatikan vortkarakteron. Substantiva kaj adjektiva ĉefelementoj substantivigas la antaŭan flankelementon, verba ĉefelemento faras el ĝi aŭ adverbon, aŭ adjektivon (predikatan atributon).

Ekzemple *ĉambro*, kiel ĉefelemento, substantivigas la antaŭan flankelementon, oni povus diri, ke *ĉambro* estas *o-ĉambro*, do *dormĉambro* estas sence *dormo-ĉambro* (*ĉambro de dormo*). Same: *riĉa* estas *o-riĉa*, do *belriĉa* estas sence *belo-riĉa* (*riĉa je belo*). *Murdi* estas *e-murdi*, do *paŝmurdi* estas *paŝemurdi*; *igi* estas *a-igi*, do *ŝtonigi* estas *ŝtona-igi*.

Tute same estas la afero pri la finaĵoj, se ili ne estas pleonasmaj. Ekzemple en *skriba*, la finaĵo *a*, kiel memstara adjektiva elemento, postulas antaŭan substantivon, ĝi estas kvazaŭ *o-a*. Sekve ĝi substantivigas antaŭ si la verban radikon *skrib'*: *skriba* do estas *skribo-a*: *i karakterizita per* (aktiva aŭ pasiva) *skribo*. Same, en *marteli* la finaĵo *i*, kiu estas kvazaŭ *e-i*, adverbigas la antaŭan

substantivon, la analizo do estos *martele-i*, do *funkcii martele* (per martelo).

Ĝis nun la afero estas tute simpla. Nun venas iom da komplikaĵo. Nome, la reefiko de la memstara finaĵo povas rilati jen al la lasta elemento sola, jen al la tuta radikkomplekso kune. Ekzemple en *voĉdono* la o-finaĵo rilatas sole la verban radikon *don* kaj ĝin substantivigas; siavice, la substantiva vorto *dono* postulas antaŭan substantivon, la analizo do estos: *voĉo-dono* (dono de voĉo). Male, en *bonfarto* la finaĵo o rilatas ne aparte al la lasta elemento *fart*, sed kune al ambaŭ elementoj *bonfart*. La analizo do estos (bonfart)o, aŭ ĉar *farti* estas kvazaŭ *e-farti*, (bone *farti*)o: *stato* (*bone farti*.)

Sed krom la ordinara vortefiko, iranta de dekstre al maldekstre, ekzistas ankaŭ vortefiko *inversa*, iranta de maldekstre al dekstre. Kalocsay foje klarigis al mi tion per la vorto *centjaro*. Ĝi estas absurda, vorto, car *cent* postulas post si pluralon. Kio do okazas? La plurala efiko de *cent* forpuŝas dum la analizo la o-finaĵon, kaj memstarigas ĝin, tiel ke ĝi ĉesas esti pleonasma, ĝi ricevas vortfunkcion. Samtempe ĝi kroĉas al *jar* la finaĵon pluralan, la analizo do estos: (*cent jaroj*)o, aŭ, ĉar o ĉiokaze estas aĵo, *centjaraĵo*.

Same *sen*, kiel prepozicio, postulas post si substantivon. En *senforta* do ĝi forpuŝas la a-finaĵon, kiu do per tio ĉesas esti pleonasma finaĵo de la adjektiva radiko *fort* kaj ricevas memstaran funkcion. Samtempe ĝi kroĉas al *fort* la substantivan finaĵon o: la analizo do estos *sen-forto-a*.

Tute same *grandkuraĝa* estas (*granda kuraĝo*)a, ĉar granda, kiel adjektivo, postulas post si substantivon.

Vortefiko kaj inversa vortefiko, jen la du ŝlosiloj, kiuj malfermas al ni la sezamon de la esperanta vortkunmeto. Post ilia trakompreno ĉio fariĝas mirinde klara, memkomprenebla. Kaj ili mem baziĝas ne sur ia arbitra elpenŝaĵo, sed sur la simpla vortlogiko.

Kompreneble ĉi tiu mallonga skizo ne povas doni imagon pri la ekstrema riĉeco de klarigoj, pri la precize ellaboritaj analizmetodoj, kiujn la studo enhavas. Ĝin oni devus instrui ĉie. Kaj ĝuste tial estus tre dezirinde, se Kalocsay ĝin foje transskribus en tute popularan formon, en formon de lemolibro, kun multaj ekzemploj kaj vasta prilaboro.

Tiun ĉi tre seriozan libron fermas ŝerco. Lingvista kaj poeta ŝerco: invento de imagita »mezepoka Esperanto«. Kalocsay denove pruvis, ke li estas ne nur la plej profunda poeto de Esperantujo, ne nur unu el la plej klarvidaj kaj plej precizaj esperantologoj, sed ankaŭ unu el la plej spritaj esperantistaj humoristoj.

## **Tradukoj**

Tre signifan parton de l' Kalocsay-verkaro okupas liaj geniaj tradukoj, plenaj de spritaj surprizoj, lingvaj revelacioj, artista perfekteco, kiu neniel



postrestas la originalojn. En ili li ellaboris sian lingvon kaj stilon, tiun ĉi ununuran trezoron de nia literaturo. Ili meritas la plej atentan studadon kaj analizadon, kiun mi nun ne volas fari pro du motivoj: unue, tio trolarĝigus la kadrojn de mia libro, due, Kalocsay nun tradukas la Inferon de Dante. La ĝisnunaj kantoj pravas, ke lia poeta kaj lingva arto en la nobla kaj triumfa lukto kun la senmorta spirito de l' giganta Mezepokano atingas sian plenan floradon, venkas tiajn superbajn altojn, pri kiuj antaŭ nelonge eĉ revii ne riskis nia senorname vestita Cindrulino: la Muzo Esperanta. Post la apero de l' plena Infero mi esperas fari tiun detalan studon.

Tamen por ioma orientigo mi volas mencii almenaŭ kun kelkaj vortoj la titolojn de tiuj ĉi verkoj.

*Johano la Brava*, (Aleksandro Petőfi, el la hungara): ĉarma, okazoplena, idilia versrakonto, vestita en popularan stilon. Tre konvena por legigo dum progresaj kursoj. (Pri tio mi praktike konvinkiĝis.)

*Morgaŭ matene*, (Frederiko Karinthy, el la hungara): tragikomedio, interesa eksperimento por rompi novan vojon por la teatro. Sub la facila sprito de l' humoristo saĝa profundo de l' filozofa.

*La Tragedio de l' Homo*, (Emeriko Madách, el la hungara): pri ĝi skribas Frederiko Karinthy jene: »La monumentan kompozicion de l' Tragedio mi povas kompari nur al tiu de l' piramido. La Faŭsto de Goethe ne havas tian

kompozicion: la kaprica desegnaĵo de ĝia historio fidele sekvas la konturon de l' homa naturo — ĝi surprenas la veston de l' animo en ĝi pulsanta, flirtanta — eble ĝia historio mem estas pli vivanta kaj pli homa. Sed se mi rigardas ilin kune: kvazaŭ mi vidas ekflagrantan flamkolonon, kiu lumigas dezertan, gigantan konstruaĵon. Tiel lumigas. Faust la Tragedion...«

*Eterna bukedo*, (el dudekdu lingvoj): breviero por ĉiu, kiu amas la Verson, talismano, kiu akompanas kaj ŝirmas kontraŭ la danĝeroj de l' griza vivo, magia manao en la dezerto de l' steriliga ĉiutago. La poeto nomis tiun ĉi bukedon eterna, ĉar li kolektis en ĝi eternajn florojn de l' Poezio, sed la leganto sentas, ke la kolektita Bukedo en sia nuna formo fariĝis eterna, ĝi vivos, ĝis iu spiros sur la tero, kiu portas en sia koro amon al nia lingvo!

Se iu trakomprenis la plenan signifon kaj pezon de la Kalocsay-verkaro, kaj volas difini ĝian indan lokon en nia literaturo kaj lingvo: por ties fantazio la Esperanta poezio surprenas la bildan formon de gracia, svelta ponto, kiu svingiĝas en la alton, kies fino perdiĝas en la senfinajn, nebulajn, sed multpromesajn forojn de l' Estonto, kaj kiu firme ripozas sur la tri kolosaj, potencaj pilastroj:

*ZAMENHOF, GRABOWSKI, KALOCSAY.*

## Kenelm Robinson

(Sceno: laktejo en la koro de eŭropa ĉefurbo. Proksimume 20 rondaj marmortabletoj kun po 2–3 seĝoj. Larĝkadra montra fenestro kun blanka kurteno, malhelpanta eventualan scivolon de l' strata publiko. Kutimaj vizitantoj: ĉefe meze salajritaj oficistoj. Kelnerinoj kun blanka, pura antaŭtuko kaj kun sama kufo. Entute blanka, orda, pura, trankvila etoso, mallaŭtaj, solidaj gestoj, moderaj prezoj kaj moderaj trinkmonoj. Tempo: ĉirkaŭ la naŭa vespere. Sezono: frua aŭtuno.

Antaŭ Ludoviko duonplena glaso da oranĝa trinkaĵo. Karlo kun larĝa malrapidemo konsumas rizan kaĉon. Por paroligi la iom reveman Ludovikon, li demandas:)

Karlo: Ĉu vi legis jam la novan libron de Kenelm Robinson?

Ludoviko: La »Homarisman Laboron«? Jes.

Karlo: Nu?

Ludoviko: Ne malbona. Eĉ, oni povas diri, bona! Tipa Kenelm Robinson. Frandaĵo. Sed ĉu li ne dissplitigos sian talenton per tiaj fragmentaj verketoj?

Karlo: Ĉu vi do principe malŝatas la miniaturan arton? Min ĉiam denove freŝe impresas la spica delikateco, la nerezistebla juneco de la skizeto: Apud Stacidomo Victoria. Vere: poemo en prozo! Unu el la plej bonaj en nia

literaturo.

Ludoviko: Nu, vi ja scias, ke mi ĉiam volonte aprezas etajn ĉefverkojn. Kaj vi estas prava: mult-oje la temoj de Kenelm Robinson estas esence lirikaj.

Karlo: Li verkis ankaŭ poemojn. Bedaŭrinde nur angle. Memoru pri »To a girl met at a dance«.

Ludoviko: Jes, per ĝi li pruvis, ke li estas vera poeto. Sed jen lia plej vunda punkto! Li ankoraŭ ne decidis, ĉu li verkos Esperante aŭ nacilingve? Ĉar ambaŭlingva verkado? Ne, tio ne estas ebla.

Karlo: Kial? Ekzemple Rainer Maria Rilke...

Ludoviko: Nura ludo de »embarras de riches-se«! Certe ne liaj francaj versoj gardos lian memoron. La verkisto, kiu volas dediĉi sin al esperantlingva verkado, devas tute alproprigi la spiriton de l' lingvo, fari ĝin vere sia karno kaj sango. La subkonsciaj praformoj de liaj pensoj kaj sentoj en li devas konsciiĝi jam kun la ritmoj, rimoj, kun la pulsado kaj spirado de tiu lingvo, per kiu li laboras. Ĉar male, ja rezultus nura mekanika tradukado. La aŭtoro de »Se grenereto...« ankoraŭ ne observis tiun nepran postulon. Tamen en la lasta tempo...

Karlo: Kaj ĉu vi kredas, ke iu, kiu havas ŝancojn ankaŭ en la nacilingva literaturo, rezignos ĝin pro esperantlingva verkado nun, kiam ĉi lasta ne tro logas per materialaj avantaĝoj, eĉ kontraŭe?

Ludoviko: Mi konas tian verkiston. Mi povas imagi, ke jam nun ekzistas verkistoj, poetoj, *homoj*, kiuj havas vortojn dirotajn al diversnaciuloj, kiuj vivas en ia internacia spirita medio, kaj estas nur nature, ke ili uzas la internacian lingvon.

Karlo: Ĉu Kenelm Robinson estas tia internacispirita verkisto?

Ludoviko: Certe. Tial mi esperas, ke li definitive kaj ekskluzive konvertiĝos al nia literaturo. Li prezentas tian valoron, ke ni nepre bezonas lin.

Karlo: Jen via unua laŭdvorto. Ĝis nun vi aŭdigis nur viajn riproĉojn.

Ludoviko: Mi pensis, ke estus superflue ripeti la laŭdojn. Vi ja certe konas miajn recenzojn...

Karlo: Kutime mi legas nur la artikolojn de mi mem verkitajn.

Ludoviko: Sufiĉe disvastiĝinta kutimo ĉe esperantistaj verkistoj.

Karlo: Kaj sufiĉe komprenebla. Sed diru do, kiajn kapablojn vi trovas tiel laŭdindaj en K. R., kiel vi apartigus lin favore aŭ malfavore de aliaj originalaj esperantistaj prozistoj?

Ludoviko: Nu, jen ekzemple karakteriza trajto eble la ĉefa: lia kuraĝo.

Karlo: Kuraĝo? Pli klare, mi petas!

Ludoviko: Nu, li estas nia unua verkisto, kiu riskis malkaŝe skribi pri seksaj problemoj.

Karlo: Ĉu tio bezonas kuraĝon?

Ludoviko: Ĉu vi dubas pri tio?

Karlo: Ne. Sed laŭ mia opinio Kenelm Robinson estas nur timeme kuraĝa. Ofte li nur ĉirkaŭflaras ĉian temon, kiel kato la trovarman kaĉon. Kaj kiu li estas? Kie li estas? Mi volus lin vidi, ekzemple en literatura matineo dum kongreso, laŭtleganta sian novelon: Amika Ago.

Ludoviko: Nu, pri ĉi tio li ja skribis tutan skizon: Alesto al la Socio. En ĝi li skribas, ke en sia intereso kaj en la intereso de la socio li estas en la privata vivo lupo sub ŝafofelo.

Karlo: Ĉu ne pli ĝuste: porko sub ŝafofelo?

Ludoviko: Pli ĝuste, sed ne tre! Laŭvere, li estas tre pura animo. Plej pura, kiam li skribas »porke«. Ĉu vi ne sentas inter la linioj la honteman animon, kiu estas ŝokata de siaj propraj kuraĝaĵoj. Mi ne mirus, aŭdante, ke Kenelm Robinson ne kuraĝas legi la verkojn, kiujn li mem skribas. Sed en la verkado li tamen estas kuraĝa, kelkfoje eĉ superflue kaj kvazaŭ. perforte kuraĝa. Ekzemple la »Amika Ago« — kiun li neniam legos, almenaŭ antaŭ publiko. Ĉu ĝi interesas nin, eble krom kelkaj interesitoj?

Karlo: Vi opinias do, ke la nenormala amvivo ne povas doni pure literaturan temon? Pensu pri la eterne belaj paĝoj de »Morto en Venecio« de Thomas Mann.

Ludoviko: Jes, la matura arto de eksterordinara talento *escepte* akceptigas

eĉ tiateman verkon. Sed por la artisto ĉia temo estas nura indiferenta materialo.

Karlo: Tro aprioria teorio! Multaj paĝoj de l' supre menciita libro facile renversus ĝin. El inter la artisme ĉizitaj linioj ĉu vi ne eksentas la ardananimon de l' homo?... Sed ni lasu la Mann-libron. Kenelm Robinson havas ion dirotan pri tiuj temoj, ia interna voĉo instigas lin por malkaŝi kaj atesti pri tiuj flankoj de l' vivo. Ĉu li sufoku tiun voĉon?

Ludoviko: Tute ne! Sed lin minacos la danĝero, ke li verkos pamfletojn aŭ gazetartikolojn anstataŭ literaturo. Per unu vorto: lin tentas la ĵurnalismo. Kaj tio signifus la finon de lia verkista kariero. El ĵurnalistoj jam elkreskis talentaj verkistoj, sed verkisto, kiu fariĝis ĵurnalisto...

Karlo: Do se vi konus Kenelm Robinson, kion vi konsilus al li?

Ludoviko: Se mi estus lia amiko, mi malpermesus al li tuŝi tiujn temojn, ĝis... ĝis li kapablos verki duan »Morton en Venecio«.

Karlo: Vi estas tro severa.

Ludoviko: Sed la libroj de Kenelm Robinson pravigas min. »La paganta gasto«, »La fremda knabo«, liberaj de seksaj problemoj, estas liaj plej sukcesaj verkoj. Kontraŭe »La manio«, »Amika ago«...

Karlo: Nu, ni do konsentis pri la kuraĝo. Kian pluan trajton vi trovas en lia verkista individueco?

Ludoviko: La karakterizan forton, tute nekutime intensan en nia literaturo.

Karlo: Ĉu tiom malofta fenomeno ĝi estus do?

Ludoviko: Bedaŭrinde. Niaj ceteraj prozistoj prefere pentras nur tipojn.

Karlo: Do li scias krei figurojn?

Ludoviko: Certe. Se mi renkontus ilin sur la strato, mi rekonus ilin.

Karlo: Sed tiamaniere li ja devus verki romanojn. Kial li ne faras tion?

Ludoviko: Malfacila demando. Tio bezonas vastan epikan rakontfluan. Ke li havas ankaŭ epikan fantazion, pravas kelkaj el liaj noveloj. Sed ĉu ĝi sufiĉos ankaŭ por pli longspiraj verkoj? Ni vidos!

Karlo: Vere, bone estus vidi! Pensu nur pri tio, kiel li aludas Esperanton! Kiel li povas viviĝi al ni per kelkaj preteraj vortoj la atmosferon de la speciale esperantista vivo. Neniu priskribis larĝe ĝis nun ĉi tiun mondon kaj se oni aludis ĝin en diversaj verkoj, tio ŝajnas altirita per la oreloj. Kvankam ĝi estas vere aparta mondo kun sukcesoj, fiaskoj, flirtoj, amoj, kvereloj, dramo kaj komiko. Li devus verki la esperantistan romanon. Aŭ — ankaŭ la esperantistan romanon. Kiu analizu nin fine, se ne li, kun sia granda hom-analiza kapablo.

Ludoviko: Vere! Kaj jen lia tria ĉefa eco: la pure analiza tendenco. Brilajn detalojn li kreas! Sed mi dubas, ĉu li kapablos ligi ilin al la ŝnuro de unueciga koncepto? Cetere, estas favora antaŭsigno, ke la verkisto mem ŝajnas konscii pri tia ĉi manko de sia talento.

Karlo: Kion vi aludas?



Ludoviko: Liajn provojn direktitajn al la simultanismo. En ili mi vidas la ĝermojn de naskiĝanta pli supera sinteza mondpercepto.

Karlo: Nu, hodiaŭ vi sufiĉe laŭdis tiun Kenelm Rohinson. Ĉu por ekvilibro vi ne povus diri ian riproĉeton?

Ludoviko: Laŭ via plaĉo. Liaj librotitoloj estas malbonaj.

Karlo: Ĉu?

Ludoviko: Nu, »Se grenereto...« kaj »Vol. II.« plaĉas al vi?

Karlo: Ne.

\*

Ĝus mi sciigis kun bedaŭro, ke tiu ĉi juna verkisto mortis neatendite. La esperanta literaturo perdis multpromesan talenton.

## Raymond Schwartz

»Jen Raymond Schwartz kun vinbotelo,  
La ĉarma an' de Epikur'.«

Malfacila tasko: la verkojn de Schwartz oni povas nur ĝui, traridi, sed analizi? Prefere mi ŝatus ilin citi de l' unua ĝis lasta vorto! Tamen mi esperas, ke la sekvantaj fragmentaj frazoj iom klarigos mian aserton, ke la nomo de Raymond Schwartz certe havas sian rajtan lokon inter la tri plej bonaj nomoj de nia literaturo. Mi uzis la vorton *klarigi*, ĉar *pruvi* oni ne bezonas: la publiko jam delonge samopinias pri tio.

Schwartz estas ridetanta adepto de vivjesanta filozofio, kiu preterlasas nenium okazon por akcenti la gajajn momentojn de l' vivo. Sed tiu ĉi laŭŝajna bohemo en la fundo de sia memo estas klarvida observanto, meditema saĝulo, kiu la rezulton de sia observado komunikas al ni en formo de mokema, sed samtempe pardona ironio. Se oni nepre ŝatas la literaturajn komparojn, la verkista sinteno de Anatole France ŝajnas al mi la plej parenca al tiu de Schwartz. Sed li estas unuavice verkisto, kiu neniam forgesas amuzi la leganton, do lia filozofio modeste retiriĝas en la fonon kaj lasas validiĝi la

verkistajn artifikojn. Kaj ni rekonu, ke la arsenalo de Schwartz estas surprize abunde provizita per tiaĵoj. Ĉu ni menciu lian vere »gaŭlan« sprilecon, kiu estas neĉiutaga eĉ en Francio, kie la civitanoj donace ricevas ĝin jam eĉ la lulilo? Ĉu ni parolu pri liaj fidele fotografitaj figuroj, tipoj el la ĉiutaga vivo, kiujn la leganto preteriris centfojojn tage, kaj kiujn en la Schwartz-libroj li trovas atente embuskitaj kaj senindulge malkaŝitaj? Kaj pri lia klara, ĉiam celtrafa stilo, kiu ne toleras ŝtopvortojn, nenecesajn devojiĝojn, etendiĝemajn kaj dubsencajn parafrazojn? Vere en la Schwartz-libroj oni apenaŭ trovas superflujajn frazojn, virto ne tre ofta eĉ esperantistaj aŭtoroj. Kaj ĉion ĉi kronas lia lingva preteco, lia fervora aventuremo, per kiu li elminas ankoraŭ nekonjektitajn trezorojn de nia lingvo.

En la versvolumo »Verdkata testamento« ankoraŭ troviĝas pecoj, kiuj dum lego efikas iom malforte. Tio ja estas komprenebla, la libro enhavas tekstojn, kiuj estas destinataj precipe por deklamo kaj kanto en la kabaredo. Veraj parizaj kanzonoj ili estas. Ilian temon donas jen la speciala esperantista vivo (preskaŭ ĉiuj tre sukcesaj), jen la ankaŭ speciala, jam iom banala, sed tamen ankoraŭ ĉiam efika temosfero de l' pariza kabaredo.

Esperantujo en Schwartz ektravis sian bardon. Kaj li ne kontentiĝas pri nura katalogado de esperantistaj tipoj, pri iom venenitaj, sed tamen ne malbon-intencaj aludoj je certaj okazintaĵoj de nia verda vivo, nek pri sukcesaj parodioj

de konataj poemoj (*En songo*), al ĉio ĉi li aldonis spritan, inventeman analizadon de la esperantaj vortoj. Kaj en ĉi tio li pruviĝis nesuperebla majstro, li havas sensaciajn ekstrovojn. Ni vidu kelkajn:

»Knabino noblakora  
Al virtaj ecoj emas,  
Dum inter viroj ofte  
Pri malĉastaĵoj temas,  
Kaj malgraŭ diverssenco  
Ne estas diferenco!  
(En ambaŭ okazoj estas  
... Virtemo!)«

Al sia dekpunkta aforismaro li aldonas inter parentezoj:

»(Tiajn aforismojn plej zorge deklamu,  
por ke neniu el tiuj dek lamu!!)«

Li malavare ŝprucas la vortludojn. Ekzemple: renkontiĝas du amikinoj, kiuj jam delonge ne vidis unu la alian. Kompreneble tuja scivola pridemandado. La dua envie demandas, kiel ŝi akiris tiom da edzoj »dum viromanka tempo«. La alia konfesas, ke per helpo de anoncoj en esperantaj gazetoj:

»Kaj kiam nin la pastro benas,  
Ĝi estas dank' al Esperanto!«  
La dua diris: Mi komprenas,  
Por vi ĝi estas... Edzperanto!!

La neesperantistaj versoj de Schwartz temas pri la *bonfara influo de la alkoholo*, pri jam prikantitaj. sed ĉiam aktualaj scenoj el la edza vivo, pri la fidela kunulino, la pipo, pri la danĝero de la senhareco kaj pri aliaj pli-malpli gravaj epizodoj de la vivo, kiuj ĉie identas, ĉu ili havas fone Parizon, aŭ kiun ajn alian urbon de l' terglobo. Kaj estas nur nature, ke ne povis forresti versoj, kiuj aludas la seksan rilaton inter la viro kaj virino. Kvankam, rilate al la pruda tendenco sufiĉe forta en la esperanta literaturo, Schwartz; kelkfoje estas aŭdaca, li neniam fariĝas triviala. Kompreneble li ne verkas por hipokrituloj, li mem avertas en alia libro: »Ĉiu rajtas iri tra la vivo, la okulojn fermitaj. Same, ĉiu rajtas je kiu ajn paĝo fermi ĉi tiun libron. Laŭplaĉe.« Nu, hipokrituloj abunde trovas konvenan legaĵon ankaŭ en la esperanta literaturo.

La samaj kvalitoj, kiujn la leganto konstatis pri la Schwartz-poemoj, estas validaj ankaŭ pri liaj noveloj enhavataj en la volumo »Prozo ridetanta«. Nur la teknika ellaboro estas ankoraŭ pli perfekta. Sendube en la komenco de lia verkista kariero la prozo estas lia pli forta flanko. Multaj el la rakontetoj de tiu

ĉi volumo apartenas al la plej amuzaj, plej artaj la bonstilaj noveloj de nia literaturo. Ĝi estas vera breviero de gajeco kaj certe la plej bona originala esperanta novelvolumo ĝis nun aperinta! Kiom da urbaj kaj vilaĝaj figuroj, kiom da rondaj, firme konstruitaj historioj! Jen ridigas nin la malfeliĉa fornotubo, kiu detruas la pacan vegetadon de la familio Ŝmirman kaj incitas la indignon de la terura urba policisto Mops; jen gajigas la fatalaj silkaj ŝtrumpoj de la edzino de la gloravida profesoro Poluks Kubik; jen pikas la vunda punkto, kiu sin kaŝas en la individueco de ĉiu esperantisto, do nenormalulo; jen neatendita, frapanta fino de la bela aventuro; jen melankolia rakonto (ne timu, ĉe Schwartz eĉ la melankolio ridigas!) pri la pipo de Prosper; jen trafanta satiro pri la nova pentroarto: la abstraktismo; jen komika strata batalo eksplodinta en la signo de la devizo: »Protektu la bestojn«; jen ruza anekdoto pri la bapto de l' sonorilo en Mulmont; jen gaja, iom pikanta utopio pri la oficiala paroladisto (interesaj eksperimentoj por krei novajn esperantajn blasfemetojn: »Papo kaj pipo!«, »Kuko kaj koko!«); kaj fine gramatika traktato pri fundamentaj elementoj de Esperanto, baziĝante sur iom individuaj, sed surprize interesaj principoj!

Por iom montri, kiom funde konas tiu ĉi parizano ankaŭ la francan vilaĝon, ni sekvu iom detale la temon de la novelo, *Bapto de l' sonorilo en Mulmont*. La scenejo estas eta vilaĝo proksime al la batalzono de l' milito. Tempo: post la

milito. La renversita vivo iom post iom renormaliĝas. Kaj la definitivan revenon al la antaŭmilitaj tempoj simbolas la bapto de la novaj sonoriloj (ĉar la malnovajn oni forprenis por aliaj celoj...). Nur Mulmont ne havas ankoraŭ sian sonorilon. La kaŭzo: parte la malmultnombro de la loĝantoj, mono ja ne abundas, parte la silenta, sed obstina kaj amara militstato inter la pastro kaj sia vilaĝo. La motivojn de tiu ĉi malamikeco Schwartz pripentras per akra vida psikologio: Mulmont estas iom duonfilo de l' pastro, ĉar li loĝas en alia, pli granda vilaĝo kaj faras en Mulmont nur mallongajn vizitojn. Tio kompreneble naskas la impreson de neglektiĝo, ian »freudan« senton de *Minderwertigkeit*. Krome la pastro estas maljuna misiisto, kiu pasigis jarojn inter negroj en Afriko. Kiel ĉiuj maljuniĝintaj homoj, ankaŭ la pastro havas sian »amatan ĉevaŭton«: nome, li ĉiam perdiĝas en siaj rememoroj pri Afriko kaj la staton de l' aferoj en Mulmont li kutimas kompari kun tiuj de l' Afriko. Kaj li konkludas ĉiam malfavore al la Mulmontanoj! Kompreneble la fiero de la bravaj vilaĝanoj ne longe toleras sen revenĝo la pikemajn aludojn de patro Gaspar kaj ekiras la persista, necedema batalo, en kiu ĉiu ricevita vundo nur pliigas la amariĝon, ĉiu rikoltita venko nur intensigas la avidon je definitiva triumfo. Fine la vilaĝo preparas mortan baton por la obstina pastro: ili jam kolektis la monon por la sonorilo, sed ili neniel informas la pastron pri tio kaj pri la antaŭarangoj de la granda soleno, ili tute ne petas lian konsilon, eĉ ne pri

la elekto de la baptoĝepatroj, ili planas, ke en la lasta minuto ili sciigos lin, kiam li ja ne povas manki ĉe la eklezia parto de l' granda okazaĵo. Schwartz scias klare sentigi al la leganto, ke tia ofendo farus ne plu tenebla la pozicion de l' pastro. Sed la malluma plano ne restas sekreto antaŭ patro Gaspar, dank' al lia pia servistino, la »periskopo«, kiel Schwartz sprite trafas ŝin, kaj ĉe la fina duelo triumfas la ruza »afrikano«. Sed tion mi ne rakontas, la leganto multe ridos pri tiu amuza turno.

Kiu volas konvinkiĝi, ke Schwartz scias krei kaj poste plene eluzi komikajn situaciojn, tiu nur legu la Oficialan Paroladiston, kiun oni invitis al naskiĝo de infano por fari salutparolon (ne miru, tio okazas en, imagita Esperantujo, kie la paroloj same svarmas kiel ĉe la efektivaj esperantaj kunvenoj) kaj kiu laŭtlegas parolon destinitan je alveno de fremda samideano. Nu, mi sentas la tenton citi la tutan parolon, sed mi tamen ne faras tion, ĉar unuparte mi ne volas ŝoki miajn ŝokiĝemajn legantojn, aliparte tiun ĉi libron eble legos ankaŭ junaj esperantistoj, kaj ili eble trorapide kaj troklare komprenus kelkajn aludojn tute ne por ili destinitajn....

»Anni kaj Montmartre« estas eble la plej perfekte farita romano, kiun la esperanta literaturo ĝis nun produktis. Temas pri orfa germana knabino, kiun la amato delogis por vojaĝo al Parizo, tie ŝi perdas lin, venas en la manojn de senkonscia fripono, kiu volas devigi ŝin al la metio de stratknabinoj. Anni kun



stampita korpo, sed kun pura koro rifuĝas de la malbenata Montmartre al la hejmo. Kaj ĉio estas rakontata per simpla, natura lingvo de la ĉiutago, la leganto eĉ por momento ne estas elfrapita el tiu ĉi meza mezo de la Montmartre-a vivo. La aŭtoro feliĉe evitis la abismojn de sentimentaleco kaj moralprediko.

Eble troviĝos kelkiuj, kiuj diros, ke mia entuziasmo por »Anni kaj Montmartre« ne estas sufiĉe motivita. Ili eble rekonos la perfektan teknikon de l' aŭtoro, sed ili trovos senpretenda, ne tre grandskala la temon de l' romano. (Kelkiuj jam riproĉis al mi, ke la libro, pri kiu mi asertis, ke ĝi superas ĉion ĝisnunan en la originala esperanta romanliteraturo, ampleksas nur nemultajn paĝojn. Sed al ili mi ne respondas, mi ne povas polemiki kun iu, kiu la librojn juĝas laŭ ilia dikeco.) Nu, mi ne apartenas al tiuj, por kiuj gravas nur la formo, sed kiuj tute malatentas la temon. Kvankam mi konfesas, ke eĉ la plej bona temo estas senvalora, se ĝi ne estas fandita en sukcesan formon. Sed la temo de Schwartz estas grandioza: la Vivo mem. »Anni kaj Montmartre« tute ne estas supraĵa verko: la facila tono de ĝia stilo, la virga freŝeco de ĝia atmosfero kaŝas en si valoran kernon: la harmonian vivrigardon de l' aŭtoro, kiu superece venkas la malfacilecojn kaj ombrajn flankojn de la vivo, la filozofion de saĝa kompreno kaj trankviliĝinta rezigno. Schwartz akceptas la vivon tia, kia ĝi estas. Ĉu li estas la kulpa, se la vivo havas siajn krimojn, mizerojn kaj

malĝojojn? Ĉu *lin* oni devas, ataki, se lia reflektoro tuŝas dolorajn problemojn, ne tre delikatajn lokojn? Nur malfortaj kaj pekaj konsciencoj kaŝas sian kapon en la sablon! Ke Schwartz ne serĉas *intence* la ombron, ke li nur fidele redonas tra sia kalejdoskopa, magia prismo tion, kion la vivo montris al li, ke li estas same sentema ankaŭ por la sunaj flankoj, tion pravas ĝuste tiu ĉi romano. Ĉirkaŭ la figuro de tiu ĉi kompatinda, erarvaginta infano mi sentas ian helon kaj varmon: la suno de l' senkulpeco elradias ilin!

La dua versvolumo, la ĵus aperinta »La stranga butikoj« montras la poeton jam egalranga al la prozisto. La vivfilozofio de l' poeto manifestiĝas kun plena matureco. Kun ridetanta indulgo li rigardas la malicajn paradoksaĵojn de l' vivo, kun pardonema, simpatianta kunsento li akompanas la stumblojn kaj faletojn de l' ĉiutaga homo, nenia hipokrita supereco malsincerigas lian klaran rigardon. Schwartz kapablas ekvidi eĉ en la plej ĉiutaga, plej banala okazintaĵo de l' vivo la *sub specie aeternitatis* homan, la en ĉiu nepre *komunan*, tute ne konsiderinte socian aŭ intelektan rangon. Kaj ĉion ĉi li esprimas per delikata, facila, serena stilo, li scias trakti seriozajn kaj profundajn temojn en la plej klara, plej simpla formo. Li uzas la plej banalajn, plej ordinarajn vortojn por esprimi siajn plej gravajn dirotaĵojn kaj kelkfoje la plej ĉiutaga substantivo aŭ atributo ricevas ĉe li tute novan, neniama konjektitan perspektivon.

Kompreneble vortludoj troviĝas ankaŭ en la nova volumo. Kaj inter ili ni

trovas vere spritajn. Precipe la poemo: *La diversaj aĝoj de l' homo* estas tre brila. Ni vidu kelkajn strofojn:

»En supra ĉambro, lulo... lulo...;  
Anĝele dormas la etulo:

Etaĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras  
Kaj pri la bela mondo miras:

Miraĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo  
Knabinon ĉien sur la vojo:

Vojaĝo.

Al ŝi li donas sian nomon:  
Por fondi kune novan domon:

Domaĝo.«

La novan serion de »Ne estas diferenco« mi trovas malforta. (Escepte la strofon pri la »amputo«!) Verdire mi preferas tiujn poemojn de Schwartz, kie li ne uzas vortludojn, sed kie li manovras per pli profundaj specoj de l' humoro. La ŝato al vortludo karakterizis la junan Schwartz kaj ĝi kelfoje delogas la

poeton sur falsan vojon. Ekzemple la »Japana balado« videble estas verkita por la, certe tre sprita, vortludo: »harakiri-har-akiri«. Sed ĝi ne sufiĉas por 42 linia verso.

Multe pli valoran formon de l' humoro prezentas liaj parodioj pri esperantistaj poetoj. Vera perlo estas en tiu ĉi speco prikantado de somero en diversaj stiloj. Jen komencanta esperantisto, jen trubaduro, jen Julio Baghy, jen spiritulo, jen pia poeto verkas sian oklinian version kun la samaj rimoj: limak-cel-atak-sitel, ofer-somer-voj-ĝoj. Ĝi estas vera deserto por la ĝukapabla, leganto. Ni embusku lian imitarton je du duonstrofoj, de lia Baghy-parodio verkita pri la poemo: »La polvohomo meditas«. Ĉe Schwartz la verso titoliĝas: »La vidvohomo meditas«.

Jen la Baghv-duonstrofoj:

»Multfoje, se la vivo bojas,  
perfide pri mortfalo ĝojas,  
en koto gruntas, stulte mutas,  
senhonte juĝas, persekutas,«

— — — — —

»mi tiam volus maŝon ligi,  
sur sekan branĉon min pendigi

kaj langmontrante moki vin,  
vi, fie glora homdestin' .«

Jen la Schwartz-duonstrofoj:

»Multfoje, se la vidvo bojas,  
Perfide pri bankroto ĝojas,  
En grunto kotas, mute stultas,  
Senĝoje hontas, katapultas,«

---

»Li tiam volus maŝojn ligi  
Kaj la poetojn tuj pendigi,  
Ĉar ili vere mokas lin  
Kun sia brua rimmaŝin' !«

Oni povas nur bedaŭri, ke Schwartz tiel avaris pri tiaj parodioj. Li certe brilus per similaj imitoj de kelkaj el niaj plej konataj prozistoj.

La esperanta vivo ankaŭ en tiu ĉi libro feliĉe inspiris la poeton. Oni nur legu la aludplenajn *sibilajn orakolojn*:

»Ŝi tiam prenis libron (ĉar libron ŝi posedis),  
Eklegis dek liniojn kaj lace jam oscedis,

Ŝi dormis... kaj ekdormis eĉ dika araneo  
Falinta sur la libron: la »Idoj de Morfeo«...

---

Mi vidas nun tri virojn, — aŭ eble estas kvaroj —  
Jungitajn — (sed sen Teo) — al ĉaro de l' Vortaro;  
Venkitaj de la SAT'o jen ili tiras, puŝas...  
Ho sankta Kabe, helpu! — Ĉi tiuj kvar akuŝas!«

Oni legu la *Telegramon*, spritan moketon pri la Schererismo, aŭ la novmetodan (ĉu vere nov-?) poemon: *P. P. P. aŭ Por Plenigi Paĝojn*, destinitan al Salo Grenkamp, la *Forgesitan Rimportreton*, la ruzan nelogismo-kolekton de l' *Lamenlado*, la vervajn *Epigramojn*: kaj oni plene kaj amuziĝante konvinkiĝos, ke la esperanta vivo jam nun povas sukcese inspiri, se la poeta genio ne mankas!

La trunkon de l' libro formas poemoj, en kiuj Schwartz komunikas sian vivfilozofion, pli supre jam karakterizitan. Ni trakure rigardu tiujn ĉi versojn: ni trovas ĉi tie petolajn versojn pri la eterna temo: la virino. (Tentado, Ne intence, Amo ĉiama k. t. p.) trovas en ili multkoloran panoramon de l' urba vivo. Ankaŭ la grandurba almuzulo aperas antaŭ ni:

»Viro eble kvindekjara  
Kun mizera masko,  
Tial, ke kompaton vek  
Estas lia tasko.«

Ĉu vi vidas, la stranga, groteska esprimo de l' lasta frazo estas pura Schwartz! Plentrafe li karakterizas ankaŭ la mizantropojn:

»Laŭ ilia perspektivo  
Ĉion kovras ĉasta gaz',«

La adjektivo »ĉasta« uzata atribute al la gazo kun sia surprizeco efektas kiel... bombo! Jen stranga aventuro atendas nin *en la kinemategrafejo*:

»Tie ĉi amuzaj scenoj  
Vigle pasas sur l' ekran':  
»Baptofest' ĉe indiĝenoj  
Meze de Baluĉistan'...«  
Kun pianoakompan'...«

Tiu ĉi refrapiĝanta »pianoakompan'« tuj lulas nin en la atmosferon de grandurba etkino. Sur la sekvanta paĝo amuzas nin mordanta satiro pri la »ĉastemulino«, kiu venigas policiston kontraŭ sinjoro, kiu ĉiutage antaŭ

malfermitaj fenestroj kvaronhoron nude gimnastikas. Dum la pritraktado oni informiĝas, ke en la proksimo ne estas najbara domo, do la sinjoro ĝenas neniun. Al la miranta policisto la akuzantino klarigas:

»Kredu, ke mi vidas lin  
Per... binoklo tre detale.«

*La nigra tago* riprentas unu el tiuj fatalaj tagoj, kiam serio da malfeliĉoj sinsekve vizitas bedaŭrindan viktimon. *Laŭ vidpunkto de heliko*: unu el la plej ĉarmaj »bestfabeloj«, kiujn mi legis. Rakonto pri sane malmelankolia renkonto de gehelikoj. Amiko Sturmer pardonu al mi, ke mi ne interesiĝas pri ĝia naturscienca bazo... Jen meditado en formo de facilaj versoj pri la *tro homa sorto de iu neĝhomo*. Jen terura epopeo de teruraj travivaĵoj en la *vagonrestoracio*. *Antaŭsigno*: varmtonaj, melankoliaj grimacoj pri la forpaso de l' juneco. Ĝia fundpenso: estas, certa signo de l' maljuniĝo, se oni kondamnas tion, kion oni faris junaĝe:

»Ho, kara nia«, tuj ni ĥoris,  
»Vi kadukiĝis efektive:  
Bruligi, kion vi adoris,  
Signifas morti jam dumvive!«



Kaj ĉu mi parolu pri la bela paro: la pia, predikema Brumm kaj la diboĉema, bohema Pipenbek? Ne, mi nur povus citi tiun ĉi perlon de la Gaja Muzo! Sed mi ne havas pli da papero.

La esperanta Muzo en sia bonhumoro donacis al ni tiun ĉi klarmensan kaj spritan samideanon.

## **JK. R. C. *Sturmer***

Denove Karlo kaj Ludoviko parolaĉemas, aŭ pli precize dirite nur Karlo, kiel vi vidos el la sekvontaĵoj:

K.: (en la mano kun numero de Literatura Mondo). Ludoviko!

L.: (silentas kun la mieno de beatiginta fakiro).

K.: Ludoviko!

L.: (denove silentas).

K.: Ludoviko! Ĉu viaj oreloj ŝtopiĝis?

L.: Lasu ilin en paco! Ĉu vi ne vidas, ke mi meditas pri profundaj problemoj?

K.: Gratulon pro la triopa »pr«. Iom post iom vi iĝos aliteraci-maŝino! Sed en prozo ili iom ĝenas min. Cetere kio estas la temo de via mormmiena meditado? Ĉu eble la mondkrizo?

L.: Je sankta Schwartz! tute ne. Kontraŭ tiaj pensoj mi havas kuracilon aĉetitan ĉe certa pariza butikio tute ne lastranga... Ne, mi cerbumas pri la aglutina teorio.

K.: Pri kio?

L.: Pri la aglutina teorio. Ĉu vi ne aŭdis pri ĝi?

K.: Neniam.

L.: Kia esperantisto vi estas do? Onidire ĝi estas la plej grava malkovro de esperantologio.

K.: Nu, se oni tiel diras, diru *vi* al mi, kio ĝi estas?

L.: Laŭ tiu ĉi teorio Esperanto apartenas al la aglutinaj lingvoj.

K.: Nu, kaj? Nun mi momente ne rememoras miajn lingvistajn konojn...

L.: ... kiuj cetere neniam ekzistis. Do laŭ lingvistica leksikono: »Aglutinaj estas tiuj lingvoj, en kiuj la vortoj deriviĝas pere de agluitaj sonoj aŭ silaboj, kontraŭe en la fleksiaj lingvoj mem la vokalo de l' radiko povas ŝanĝiĝi. Ekzemple fleksia estas la germana, aglutina la ĉina lingvo.« Nu, laŭ la esperantaj aglutinistoj Esperanto estas aglutina lingvo.

K.: Sed tio ja estas klara, ĉu vi ne samopiniis?

L.: Certe. Ne tio kaŭzas al mi kapdoloron. Mian mallingvistan cerbon turmentas nur la sekreto, kial niaj lingvistoj tiom multe pridiskutas tiun ĉi fakton simplan kiel duoble du estas kvar?

K.: Mi envias vin pro via anĝela naiveco! Nu, teorioj servas por paroligi la homojn pri la teoriistoj... Sed jam de duonhora vi ne lasas min elparoli mian demandon surlangan!

L.: Eligu.

K.: Kiel plaĉis al vi la Sturmer-poemo aperinta en la septembra numero de Literatura Mondo?

L.: Kiun la aŭtoro dediĉis al kvinjara germana knabo? Nova temo, simultana mondpercepto. Interesa kaj forta eksperimento, sed bedaŭrinde ne ellaborita. En pluaj partoj ĝi disfluas en prozon. (La aŭtoro mem nomas ĝin prozo, sed tio estas ŝerco! Eĉ la prozformaj versoj estas versoj, se poeto knedas ilin. Kaj partoj ankaŭ de la Sturmer-poemo proksimiĝas al la verso.) Pli ligita formo estus doninta pli feliĉan solvon. Lirikisto estas miniatur-artisto, kaj miniatur-artisto neniam povas kontenti, li devas ĉiam repreni la ĉizilon, la skulptilon kaj knedi, formi la materialon, ĝis...

K.: Kiaj ŝimaj teorioj! Ĉu grandskalajn, novajn, modernajn temojn oni jungu en la jugon de l' rimoj? Ili ja volas marŝi longpaŝe kaj larĝspire, sen kateno kaj brido!

L.: Nu, unue: en la poezio mi ne konas modernajn temojn, nur eternajn, due: mi ne insistis pri la rimoj, nur pri temotrakto pli perfekta, pli ellaborita en detaloj. Cetere, se vi foliumas italan antologion, vi vidas, kiajn diversajn temojn prikantis poetoj, ĉu malnovaj, ĉu modernaj, en la sama miniatur-formo, la soneto? En Japanio la severa versformo »tanka«, iĝis deviga kaj ununura, kaj, ĉu tio malhelpis la naskiĝon de bonegaj poemoj? Mi riskas diri: se en Eŭropo la soneto estus la sola ĝenerala kaj deviga formo, mi vidus en tio nenian danĝeron por la eŭropa poezio.

K.: Laŭkutime vi perdiĝas en la teoriado. Nur ke Sturmer estas vera

miniatur-artisto, tion atestas liaj noveloj.

L.: Mi rekonas. La *Skatoletoj de ĉokoladoj* estas novelo en la plej dibenita senco de l' vorto. Kaj malpacience mi atendas lian baldaŭ eldonotan novel-libron. Ankaŭ lia pretiĝanta taglibro, plena de sagacaj notoj pri la vivo, pri esperantaj aktualajoj k.t.p., tre interesas min. Sed mi ŝatus legi de li ion pli longan, eble romanon...

K.: Kaj la »Por recenzo«?

L.: Sed ĝi estas nur fragmento de romano. Sincere konfesante tiu ĉi libro iom ĉagrenis min. Legante ĝin oni impresiĝas, ke ĝi estas uverturo de tre interesa romano, en kiu per nekutima mikroskopa akreco

»... montras sin kalejdoskope  
Londona vivo hejma, strata...«,

kaj oni venas al la lasta paĝo kaj la romano abrupte finiĝas sen vera fino, kvazaŭ tranĉite per tondilo.

K.: Sed kiel mi aŭdis, Sturmer nun verkas grandan romanon, en kiu respeguliĝos la interna vivo de l' esperantistaro.

L.: Grandioza tasko, sed mi esperas. Se Sturmer plene sindonos al la temo, eblos, ke ni ricevos la delonge sopiratan, sed ankoraŭ ne ricevitan romanon de nia movado.

K.: Nu, kaj kian opinion havas la recenzisto pri la recenzisto-kolego?

L.: Kelkfoje vi havas embarasajn demandojn.. Nepre lia ĉefa kritikista virto estas lia sincereco. Kaj verdire li kelkfoje eĉ troigas ĝin: ekzemple en iu recenzo pri grava romano li publike konfesis, ke li la libron ne ellegis. Nu, tiajn konfesojn recenzisto neniam faru, eĉ se... Cetere mi ŝatas liajn kritikojn, lia juĝo nur kelkfoje eraris. Sed kiu estas sen eraro? Eĉ ne la recenzistoj! Tamen etan mankon, rapide kuraceblan, mi malkovris.

K.: Kion?

L.: Li estas tre kutimiĝinta al la kadroj de International Language. Li estas tro miniatura, kiam li recenzas en aliaj revuoj. Cetere estas bedaŭrinde, ke tiu literaturema angla gazeto ĉesis. Ĝi kolektis multpromesajn junajn britajn talentojn: Newell, Robinson, Sturmer kaj aliaj...

K.: Jen via konsekvenceco! Nun vi riproĉas al Sturmer lian miniaturremon, antaŭe vi apoteozis la miniaturan arton!

L.: »Nur la bovo estas konsekvenca!«

## Francisko Szilágyi

Ĉu estis, ĉu ne estis, estis antaŭ tiel longa-longa tempo, ke eble eĉ ne estis vere: estis en la tempo, kiam sur la tero ne regis ankoraŭ la Harmonio. La tiaman reganton la homoj nomis jen Milito, jen Mono, jen Juro, jen Politiko kaj jen per aliaj nomoj. Ĉiu homo alie nomis lin kaj ĉiu homo kredis lin alia persono kaj opiniis, ke nur li servas al la ĝusta kaj justa Reganto. Sed sub ĉiuj ĉi nomoj kaŝiĝis la sama Spirito, kiu estis tre malbona kaj tre malica sinjoro, li estis la neanto de la Harmonio kaj vivtenis sin per la manĝado de ĉiu bono, kiu en la homaj koroj ekfloris, de ĉiu klaro, kiun la homaj cerboj produktis. La malbenata regado de tiu ĉi spirito kaŭzis, ke la homoj malamis unu la alian kaj ilia pensado fariĝis tre konfuza. La Harmonio, kiu naskiĝis el la unuiĝo de la Intelektulo kaj Amo, estis ekzilita de la tero.

Sed la Harmonio ne kapitulacis. Kiel heroldon de sia armeo, ŝi sendis sur la teron Lingvon senmakulan kaj ĉastan, kiun ŝi donacis per miraklofara kapablo: tiu ĉi lingvo forpelis la malamon de tiuj, en kies koroj ĝi enradikiĝis. Kaj troviĝis homoj, kiuj kun ĝojo akceptis la belsonan lingvon kaj komencis instrui ĝin al la aliaj homoj. Inter ili estis ankaŭ la tre fervora oĉjo Francisko.

Sed la malica sinjoro ekkoleris vidante la triumfan antaŭenmarŝon de la

heroldo kaj lia furiozo unuavice sin turnis kontraŭ oĉjo Francisko. La malica sinjoro forturnis la atenton de liaj lernantoj, ili estis preskaŭ ĉiuj jam plenaĝaj viroj kaj virinoj, kaj sub la influo de la maliculo ili ne multe zorgis pri la instruo de oĉjo Francisko (same okazis ĉe la aliaj instruistoj, la malica sinjoro ĉeestis ĉie), dum la lecionhoroj ili prefere amindumis aŭ dormis, rezulte ili nur tre malmulte ellernis la lingvon, ne povis legi bonajn librojn, kiuj estus gravurintaj la amon al la lingvo tiel profunden en ilian koron, ke eĉ la malica sinjoro ne estus povinta elŝiri ĝin de tie, sed ili ne nur neglektis la plenan ellernon de la lingvo sed ili ĉiam grumblis kaj kriegis, se iu fervora poeto, volante riĉigi la lingvon, uzis neologismon, kaj ili postulis nur tian literaturon, kian eĉ la suĉinfano povas kompreni... La malica sinjoro jam kun malica rikano antaŭĝuis sian denovan venkon.

Sed oĉjo Francisko ne lasis sin venki kaj elpensis ion ruzan. Nu, ĉiu plenaĝulo, se li fariĝas lernanto, fariĝas samtempe infano. Ni do fabelu al ili. Kaj oĉjo Francisko komencis fabeli kaj fabelis tiel bele, ke ĉiuj lernantoj ellernis la lingvon, la dumleciona dormado ĉesis kaj la amindumado... nu, ĝi ne ĉesis, sed por ĝi oni uzis la novan lingvon. Kaj la malica sinjoro furiozis, ĉar oĉjo Francisko per la helpo de la *modernaj fabeloj* kondukis la novajn adeptojn al la ĝuo do pli komplika literaturo. Ĉar kiu gustumis tiun ĉi simplan lingvon, eklernis legi ankaŭ la pli malfacilajn librojn.



Se la lernantoj ne tiel rapide estus ellernintaj Esperanton, ankoraŭ pli longe daŭrus mia fabelo.

## Biografiaj notoj

Julio *Baghy*. Naskiĝis: 1891. Profesio: aktoro. Edziĝis dufoje, la duan fojon en 1924. Dum 5 1/2 jaroj estis militkaptito. Esperantistiĝis en 1910. Verkoj: *Preter la vivo* (unna eldono en 1922, dua en 1931), *Pilgrimo* (1926), *Dancu marionetoj* (1927), *Migranta plumo* (1929), *Viktimoj* (unua eldono en 1926, dua en 1930), *Printempo en aŭtuno* (1931), *Hura* (1930). Ĉefredaktoro de *Literatura Mondo*. (La »Printempo« aperis en la eldono de Heroldo, la aliaj en tiu de *Literatura Mondo*.)

Karlo *Bodó*. Naskiĝis: 1903, en Monor, Hungario. Oficisto. Edziĝis en 1930. Finis superan komercan lernejon. Verkoj: (tradukoj): Frederiko Karinthy: *Norda Vento* (1926), Miĥaelo Babits: *La cikoni-kalifo* (1929). (En la eldono de Rudolf Mosse, serio: Biblioteko Tutmonda.) Responda redaktoro de *Literatura Mondo*. Esperantistiĝis en 1921. Preferataj verkistoj: Babits, Couperus, Karinthy, Thomas Mann, Meyrink, Poe, Strindberg, Wilde.

Hilda *Dresen*. Naskiĝis: 1896. Radio-telegrafistino. Esperantistiĝis en 1913. Ektradukisen 1922. Verkoj: Marie Under: *Elektitaj versaĵoj* (1929), J. Barbarus: *Horizontoj* (1931). (En la eldono de Esperanto-Asocio de Estonio.) Preferataj verkistoj: Dostojevskij, Tolstoj, Gorkij, Rolland, Barbusse, Gide, Lawrence, Wassermann, St. Zweig, Strindberg, Panait Istrati, G. Gunnarsson

k.t.p.

Stellan *Engholm*. Naskiĝis: 1899, en Stockholm. Popollerneja instruisto. Edziĝis en 1922. Esperantistiĝis en 1920. Verkoj: *Al Torento* (1930), (en la eldono de Heroldo), *Homoj sur la tero* (aperonta ĉe Literatura Mondo en julio de 1932). Preferataj verkistoj: Cervantes, Rabelais, Swift, Shakespeare, Goethe, Alexis Kivi, Dostojevskij, Gonĉarov, Cikamacu.

Jean *Forge*. Naskiĝis: 1903. Verkisto. Fraŭlo. Finis gimnazion, aŭskultis tri semestrojn ĉe politeknika altlernejo Danzig. Esperantistiĝis en 1919. Ankaŭ filmverkisto. Verkoj: *Abismoj* (1923), (finne en 1924, ĉine en 1928), *Saltego trans jarmiloj* (1924), *Mr. Tot aĉetas mil okulojn* (1931, germane en 1932). Preferataj verkistoj: Przybyszewski, Ludwig Wolf, Vicki Baum. La unuaj du verkoj ĉe Hirt und Sohn, Leipzig, la tria ĉe Literatura Mondo.

Nikolao *Hohlov*. Naskiĝis: 1891 en Moskvo. Lernis en gimnazio kaj privata komerca instituto. Supera ekonomiisto ĉe industria trusto. Edziĝinta. Esperantistiĝis en 1905. Verkoj: lingvaj notoj, kronikoj, kritikoj, tradukoj el la rusa, angla kaj serba lingvoj, aperintaj de 1908 en diversaj gazetoj. »La tajdo« (1928, en la eldono de Heroldo), *Morto de la delegito de UEA* (1925 en Zagreb). Kunlaboras pri granda rus-esperanta vortaro. Preferataj verkistoj (en Esperanto): R. Schwartz, K. Kalocsay, S. Rublov, E. Drezen.

Kolomano *Kalocsay*. Naskiĝis: 1891, Abaújszántó, Hungario. Ĉefkuracisto

en Urba Hospitalo por Infektaj Malsanoj, docento de la budapeŝta universitato. Lernejoj: universitato (medicina) en Budapest. Milit servo: el kvin jaroj tri sur la militkumpo, kiel kuracisto. Edziĝis en 1929. Lingvokono: germana, franca, angla, kompreno do ĉiuj latinidaj lingvoj. Pseŭdonimoj: Kopar, C.E.R. Bumy. Esperantistiĝis: 1910. Ĉefredaktoro de Literatura Mondo. Verkoj: Kantanta kamparo (1923), Petőfi: Johano la Brava (1923), Madách: La tragedio de 1' Homo (192/4), Karinty: Morgaŭ matene (1923), Streĉita Kordo. Originalaj poemoj. (1931), Lingvo Stilo Formo (1931), Rimportretoj (1931), Eterna Bukedo (1931), Goethe: Romaj elegioj kaj la Taglibro (1932), Poezia Gvidlibro (kun G. Waringhien, 1932). (La Madách kaj Karinty-libroj aperis en la eldono de Hungara Esperanto Instituto, la aliaj ĉiuj en tiu de Literatura Mondo.) Preferataj verkistoj: Dante, Goethe, Ady, Dostojevskij, Baudelaire, Garducci, Keats, Galsworthy, Lewis Sinclair.

Raymond *Schmartz*. Naskiĝis: 1894. Bankoficisto. Lernejoj: gimnazio ĝis »Abiturient-ekzameno«, Edziĝis en 1927. Lingvokono: germana, franca (gepatra); angla, hispana, itala. Preferataj verkistoj: Georges de la Fouchardiere, Anatole France kaj multaj aliaj. Verkoj: Verdkata testamento (1926), Prozo ridetanta (1928), Anni kaj Montmartre (1930), Koro estas eta instrument' sekreta (1930), La stranga butikoj (1931). Ĉiuj en la eldono de Esperantista Centra Librejo.

K.R.C. *Sturmer*. Naskiĝis: 1903, en Poole, Dorsetshire, Anglio. Dentoteknikisto. Edukiĝis en medio de kulturburĝa klaso ĝis aĝo dekkvar, kiam li forlasis la lernejon kaj lernis metion, dumvespere li akiris kulturon per lego de literaturaj, sociologiaj, biografiaj k.t.p. libroj. Esperantistiĝis en 1922. Preferataj verkistoj: Anatole France, Petronius, Proust, Gide, Babits, Karinthy, Stamatov, Chesterton, krom verkistoj, nekonataj ekster anglalingvaj landoj. Verkoj: Por recenzo! (1930), Esperanto literature (anglalingva). (En la eldono de Esperanto Publishing Co).

Francisko *Szilágyi*. Naskiĝis: 1895, Budapest. Advokato. Edziĝis: 1923. Lingvokono: germana, franca, latina. Verkoj: Poemano en Hungarlando (1929), La simpla Esperanto (1982), Trans la Fabel-oceano (1982). (En la eldono de Literatura Mondo.) Preferataj verkistoj: Jacobsen, Dostojevskij kaj multaj aliaj.

## Neologismoj

aprezi	kompetente taksi la artan valoron de io.
aprioria	konkludita nur el teorio
bohema	fantazie vivanta en gaje portata mizero
breviero	ĉiutaga pastra preĝlibro
bunla	multkolora
drivi	esti portata de fluo
dura	malmola
etoso	atmosfero de loko
evento	pli grava okazaĵo
fono	fundo de scenejo
gapi	rigardegi absorbiĝinto
jubili	ĝojkrii
kanzono	kantata poemo
kontesti	diskuti, malakcepti aserton aŭ postulon
lici	esti permesate
matineo	literatura aŭ arta prezontado matene
morna	preme malgaja
obsedi	premokupi la spiriton

panegiro	longa solena parola aŭ skriba Jaúdo
predo	rabakiraĵo, militakiraĵo
spleno	malsana stato de la animo karakterizata per konstanta enuo kaj indiferenteco al ĉio.
strikta	streĉmalvasta, severe fiksita
stumbli	faleti, falpuŝiĝi
sturni	kurataki
ŝtormo	furioza vetero
sublima	majeste nobla, belega
superba	impone, pompe bela
trista	malĝoja